

V-4252/31 (1988)

1988 julio-aŭgusto

81-a jaro

n-roj 991-992 (7-8)


aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)

sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Togolanda Unesko-federacio
plene subtenas la Movadon

Vi trovos,

multlandan numeron, kun novaĵoj kaj artikoloj el Brazilo kaj Pollando, Togolando kaj Svedio, Japanio kaj Ĉeĥoslovakio, Sovetunio kaj Israelo. Politikajn kaj kulturajn barojn ĝi spitas, kiel devus neŭtrala renkontejo — kaj se la opinioj ofte malsamas, almenaŭ la voĉoj restas je tolerebla nivelo de laŭteco. Kriado komprenigas nur malaŭskultemon. Kaj mankon de humursento — ĉar ĉu ne estas amuze, ke nia malgranda idealistaro pretendas ŝanĝi la mondon, interalie per diskutoj pri gramatiko? Ĉu ne eĉ pli ridige, ke ĝi pravas? Ĉar gramatiko kondukas al lingvo, kaj lingvo al aferoj, kiujn post cent jaroj ni nur komencas malkovri. Estos pli da gramatiko post la kongresa numero. Ĝis tiam!

Enhavo

- 121 Por ke organizaĵo estu tutmonda... Pensoj pri plidemokratiigo de UEA (Mark Fettes)
- 123 Landa agado: Enoficigo de UTE kronis la Togolandan agadon (Gbeglo Koffi)
- 124 Subtenu movadan monumenton en Litovio! (Litovaj esperantistoj)
- 125 Kongresoj kaj kunvenoj: Granda terminaro markas fervojistan kongreson en Francio (G. Ritterspach); Poloj honoras siajn pionirojn
- 126 Religia agado: Valoris lerni en Japanio (Flóra Szabó-Felső; Brazila ekumenisma organizaĵo pli uzos Esperanton (Jorge das Neves)
- 127 Politika agado: Radikalaj ŝancoj (Karl-Heinz Renschler); MEM ekrekonstruas sin (Roland Schnell)
- 128 Seminarioj: Ne nur instrui, sed eduki (V. Barandovská); Virinoj kune en Svedio (Linnea Edsenius)
- 129 Movada organizo: ★ aŭ ☉? (Ivo Durwael)
- 130 Kulturo: Survoje (Aleksandr Fjodorov)
- 132 Lingvo: Pri la nomoj de monatoj kaj semajntagoj ... (Ŝiger Ujeki); ... kaj de la alfabeto (Jeremi Gishron)
- 134 Recenzoj: *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, red. José-Luis Melena Jiménez k.a. (Klaus Schubert, Kris Long, Ryszard Rokicki)
- 136 Jubileoj: Du movadaj centjariĝoj (Olga Cankova, Hermann Schmid kaj Ester Keil)
- 137 Reagoj: Alia muziko por "La Espero"? (Carlos A. Santos, I. de Miranda e Silva, May Bijleveld); Erari estas home ... (Dermod Quirke); ... kaj ankaŭ gramatike (Aldo de' Giorgi, Audrey Childs-Mee)
- 138 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 139 Foliome (pripresaĵaj raportetoj)
- 140 Oficiala informilo

La kovrilo

S-ro Lonlon Dzedzikou, prezidanto de Federacio Togolanda de Asocioj kaj Klubo Unesko, eĥis mirinde trafe la Esperantan lingvo-filozofion en parolado ĉe la oficialigo de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (p.123-4). Kompreneble ni al kutimiĝis al belaj vortoj sen korespondaj agoj! Malantaŭ tiuj ĉi tamen estas la enpreno de UTE en la togolandan Unesko-sistemon, organiza solvo eble vojmontra por aliaj junaj movadoj. La togolandanoj atingis tion en nuraj kvin jaroj: ĉu ne esperiga kaj sku-averta signo? En la sesdekaj jaroj, Unuiĝintaj Nacioj transformiĝis de okcidenta klubo al triamonda tribunalo. Ĉu tia kriza, flugildona maturiĝo nun atendas la internacilingvan movadon?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Lega**ta en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la Centra Oficejo en Roterdamo: Neil Salvesen

Estraro de UEA

Prezidanto (planado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (faka agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (administrado, kongresoj, financoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.



Por ke organizaĵo estu tutmonda . . .


Pensoj pri plidemokratiigo de UEA

Tiu ĉi artikolo estas respondo al kelkaj leteroj kaj aliaj reagoj, kiuj venis sekve al la artikolo en majo, "Kien UEA . . . ?"

E fektive la Esperanto-movado eniras novan tempon," skribis al mi W. De Smet antaŭnelonge el Surinamo, aludante ĉi tiun revuon sed sen plua precizigo. Estis plaĉa sed ankaŭ iom surpriza deklaro. Redaktoro ne ĉiam konscias pri la efiko ĉe aliaj de siaj raportoj kaj rakontoj, kaj certe ne ĉiu havas la saman senton de progreso. Ekzemple:

"En la revuo *Esperanto* ni ne legas 'universalan' Esperanton, sed eŭropan. Ĝia pensmaniero, ĝia esprimo, ĝiaj kunlaborantoj estas ĉiam kaj tute eŭropaj. Maloftege ni legas ekstereŭropan esprimon. Tamen, Esperanto jam tre bone evoluis en Ĉinio, en Japanio, en Sudameriko, en Kanado, en Usono. Eble *El Popola Ĉinio* atingis precize la idealan esprimon, ĉar tre facilan, rektan kaj fluan. Idiomo de nia revuo *Esperanto* estas ofte afekta, samtempe rafinita, kaj uzas parolmanieron, kiu taŭgas al literatura aŭ teknika revuo!"

Tiu plendo de Jayme Pereira, el la Amazona Esperanto-



Demando subtile starigita en la kovrilo de la jubilea Jarlibro: Kiel adaptiĝos UEA al transiro de la movada pezocentro, for de ĝia tradicia eŭropa hejmo?

Klubo, Brazilo, estas certe ne unike lia. Malantaŭ la jena laŭdo el Azio kuŝas similaj sentoj:

"Regule legi la gazeton *Esperanto* donas al mi utilon je diversaj punktoj . . . Antaŭ ĉio mi lernas la lingvon, kio estas plej grava por mi. La organo estas graveda de artikoloj kun bona lingvaĵo . . . Kompreneble mi ankaŭ gajnas novaĵojn pri nia movado. Klare videblas ĝia progreso sur la paĝoj de *Esperanto*. Mi tiam sentas min tre fiera, ke mi estas unu el la movadanoj."

La aŭtoro de tiuj linioj, korea biokemiisto Sung Ho Cho, vizitis la Centran Oficejon en majo 1988, kaj mi faris al li demandon longe kovitan: "Kial ni ne aŭdas pli ofte de la homoj en via landa movado?" "Mi kredas, ke ili timas," li respondis simple. "Ili ne sentas sin partoprenantoj en UEA. Kvankam ni multfoje kritikis la revuon, ke ĝi ne sufiĉe atentis la Movadon ekster Eŭropo, ni neniam pensis sendi al ĝi artikolon."

Ne nur la azianoj spertas tion. Jen Lutombo Yogolelo de la tanzania Maendeleo Esperanto-Klubo, kiu demandas sin kaj min, kian signifon havas la monda Esperanto-organizaĵo por lia propra mondangulo:

"Estas multaj demandoj kiujn ni [afrikaj esperantistoj] demandas nin. Ekzemple: Kio precize estas UEA kaj kion ni povas atendi el ĝi? Ni malprecize parolas pri UEA kaj skribas al ĝi demandante la kasedojn, la vortarojn, la librojn ktp. Ĉu tio estas la nura tasko de UEA? Eble, mi ne persone profunde konas UEA sed mi iomete dubas pri tio!"

"Mi vidas granda kaj vasta la laborkampon de UEA. Ekzemple: starigi reprezenton en ĉiuj landoj kie Esperanto rapide kreskas, sendante almenaŭ unu el siaj spertuloj organizi tion surloke . . ."

Kaj s-ro Pereira denove:

"Nia UEA, tute kaŝita en Roterdamo, laboras, agas, pensas kiel afekta klubo, sed ne kiel universala asocio. Eble formalismo, burokratismo, senrimedismo, samgrupismo fermas horizontale la universalecon de UEA!"

"Kion ekzemple proponas UEA favore de la movado en la mondo, ekzemple en Sudameriko? Nenion! En Afriko: iometeton! En Azio: kvazaŭ nenion . . ."

"Ŝajnas al mi, ke UEA vivas sian propran vivon, tro distance de la esperantista popolo, tro distance de Esperantujo, aparte vivas. Ni deziras UEA-n tre viglan, kuraĝan, kapablan, influan, universale politikan, apud ni, inter ni, partoprenantan niajn problemojn!"

Ni agnosku tuj, ke oni facile emas atendi tro de UEA: Ĝi ne estas tiel granda, nek la movado tiel forta, ke eblas fari ĉion farendan. Tamen baziĝas sur io reala tiu sento, ke ĝi ne respondas al siaj membroj — speciale la ne-eŭropaj; ke ĝi vivas aparte kaj fermite. Tia estis interalie mia propra impresoj, antaŭ jaroj. Sed indas unue distingi inter la strukturaj malfortoj, kiuj kondukas al tio, kaj ĝiaj tre realaj kaj valoraj kontribuoj al la movado, kiel la jenaj:

- Ĉiujara Universala Kongreso, principe en iu ajn lando kie ekzistas kompetenta movado kaj adekvataj organizaj kondiĉoj. Jam en la lasta jardeko okazis UK en Brazilo, Kanado kaj Ĉinio, kaj estas planate iri al Kubo post du jaroj: do almenaŭ tio montras internaciismon.

- Centra libroservo, kiu principe disponigas ĉion haveblan en Esperanto kaj aperigas katalogon ĉiun duan aŭ trian jaron.

- Centra movada revuo.

- Jarlibro, kiu servas kiel la plej ampleksa kaj ĝisdata gvidilo al la tutmonda movado.

- Oficejo, kiu ebligas kaj kunligas tiujn servojn.
- Reto de ĉefdelegitoj, komitatanoj, perantoj kaj komisiitoj, kiu almenaŭ principe faras la Asocion alirebla al ĉiu esperantisto.

Rilate al tiu “principe” funkcias tamen kelkaj severaj praktikaj limoj. Ni memoru, ke internaciaj organizaĵoj suferas jam pro sia naturo komunikajn malfacilojn. La membroj ne havas egalan vojaĝkapablon, ne povas interrilati rekte kaj senpene, kaj ne persone spertas plimulton de

“Sojle al la dua jarcento: Esperanto — lingvo kaj parolantaro. Kion konservi, kion ŝanĝi?”

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) jam kelkfoje proponis altnivelajn kaj internaciskale stimulajn seminariojn. Famiĝis la lokoj Bad Saarow kaj Ahrenshoop. Nun venu kaj kundiskutu ekzemple pri jenaj temoj:

- Kiel evoluas la lingvo? Kiel ĝi evoluu? Ĉu eblas influi la evoluon? Kiel? Kiom?
- La Akademio de Esperanto, ĝiaj aktuala kaj dezirebla funkcioj.
- La faklingvo (terminologio) en Esperanto: stato, evoluo kaj evoluigo.
- La nuntempa strukturo de la Esperanto-movado.
- La “Universalaj Kongresoj”: ĉu kongresoj? Ni re-konsideru niajn aranĝojn.
- Kiel naciskale kaj internacie evoluigi sisteman sciencan agadon pri kaj per Esperanto?
- Informoj kaj informantoj. For la diletantismon! Pri ŝanĝoj en la informa agado.

Kaj proponu aliajn temojn!

La pitoreska kuraca vilaĝo Ahrenshoop troviĝas rekte ĉe la Balta Maro, oriente de Rostock. La seminario kostas 250 markojn (plena pensio kaj programo sub bonegaj kondiĉoj). Alventago: 88.12.5, reveturo: 88.12.10.

Petu informilon de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, DDR-1080.

la agado, kiun plenumas la Estraro kaj Oficejo ilianome. Ke UEA laŭdifine solvis unu bazan problemon, tiun de komuna lingvo, ne signifas ke aliaj malaperis samtempe.

Kie plej farendas ŝanĝoj, por ke la Asocio iĝu pli demokratia, kaj por ke iom post iom foriĝu la spektro de eŭropa centrismo? Se oni restas ĉe la nunaj strukturoj, estas unu evidenta kaj esenca kandidato: la Komitato.

Tiu “supera organo de UEA” estas iuspeca federacia registaro de la movado, verŝajne ne malpli reprezenta ol multaj naciaj registaroj. Ĝin ĉefe konsistigas reprezentantoj de la landaj asocioj (detalojn vi trovos en la Jarlibro kaj en la Statuto de UEA, senpage havebla de la Centra Oficejo). En ĝia funkciado speguliĝas ĉiuj problemoj, kiuj aflikas la tutan Asocion: manko de komunikado, distanciĝo de la membraro, homaj senrespondeco kaj simpla malkapablo; kvankam troviĝas tie ankaŭ tre kapablaj kaj efikaj agantoj.

Sen funkciado de la Komitato, ne eblas koncepti funkciantan UEA. Kaj la fakto, ke malpli ol duono de la Komitato eĉ respondis en lastatempaj perpoŝtaj voĉdonoj (por ne paroli pri partopreno en pli aktiva laboro), signalas ĝian malfunkciadon. Ni ekzameniu la kialojn.

Unue, labori en la Komitato kunportas nenian personan avantaĝon, nenian prestiĝon. Dum energiaj ambiciuloj foje konkurencas por estri landan asocion, la komitatajn postenojn ofte plenigas pasivaj bonvolemluloj, kiuj transprenis taskon nedeziratan de aliaj. Tiu posteno eĉ kunportas fincan ŝarĝon, por ĉeesti la kunsidojn kadre de la UK-oj. Kial juna aktivulo, kun pli da ideoj kaj energio ol da mono, sentu sin logata al tia laboro?

Due, kandidata komitatano havas ofte nenian komprenon pri sia tasko. Esti komitatano estas tute alie, ol esti delegito, landa estrarano, kongresa organizanto, redaktoro. Kaj la kulpo ĉi tie kuŝas precipe ĉe la landaj asocioj, kiuj ne hezitas plendi pri la fuŝoj de UEA sed donas malmultan atenton al la elekto de taŭgaj homoj. Komitatano fakte estas nur duone landano; duone li aŭ ŝi estas internaciulo, ŝarĝita pensi kaj kunlabori kiel eble plej tutmonde. Tio ne venas aŭtomate kun esperantisteco.

Trie, po unu komitatano por milo da movadanoj ne sufiĉas en si mem por reprezenti ilin. Necesas strukturo por interkonsultiĝo — kaj por respondeco de la komitatano fare de la membraro. Tiu strukturo denove krebblas nur je landa nivelo, sed ĝi havas drastan efikon sur la centrajn organojn de la Asocio.

Ni devas fine celi situacion, kie precipe talentaj kaj internaciemaj homoj kandidatas por la Komitato; kie ilin elektas demokratia voĉdono; kie regule okazas informiĝo kaj konsultiĝo inter la komitataj kaj la membroj. Por tion atingi necesas du fundamentaj ŝanĝoj en la rilatoj al UEA je landa kaj membrara niveloj:

1. Pliprestiĝu komitatanecon. Necesas (a) konkretaj avantaĝoj, minimume parta vojaĝsubvencio al la kunsidoj, kaj (b) pli da strukturita respondeco en la landa movado. Oni ankaŭ konsideru postuli, ke ĉiu komitatano partoprenu en almenaŭ unu laborkomisiono (ekz. financoj, eldonado, scienco-tekniko, virina agado ktp).

2. Faru pli por kontakti la membrojn kaj sentigi al ili, ke ili estas bezonataj kaj aŭskultataj. Ĉar estas limoj al la respondkapablo de la Oficejo kaj Estraro, tio krome implicas disvolvon de ekstercentra, sub-Komitata strukturo: ekzemple, regiona reto de kunlaborantoj por ĉiu komitatano, kaj diskutigo de UEA-temoj en unu aŭ pliaj regionaj/landaj kunvenoj ĉiujare. Ne mankas materialo por tiaj diskutoj: el la lastaj monatoj, ni pensu nur pri la Bjalistoka Centro kaj la revua debato pri eldonado.

Tia ĉi restrukturigo tamen ne efektiviĝos de si mem, nek koncernas nur la jamajn agantojn en UEA. Ĝi koncernas precipe *vin*, la ordinaran membron, kiu nun malhavas kontakton kaj influon en asocio teorie via. Ja estas via landa movado, kiu nerekte kungvidas UEA. Se vi volas, ke tiu gvidado estu pli respondeca, pli vigla, malpli elita, estas unuavice via tasko kunlabore influi, kaj se necese ŝanĝi, viajn komitatajn — kaj la tutan nunan malsanon, en kiu oni parolas pri universaleco sen entrepreni la paŝojn por efektiviĝi ĝin.

Mark Fettes

Enoficigo de UTE kronis la Togolandan agadon

Antaŭ kvin jaroj, Esperanto penetris en Togolandon. De tiam junuloj lernas siamaniere la lingvon per koresponda kurso gvidata de s-ro Hans Bakker, kiu ĉiam insistas pri la utiligo de la lingvo. Tiel formiĝis la unuaj Esperanto-kluboj ATE kaj TEA.

La lerneja jaro 1986-1987 donis veran antaŭenpaŝon al la Esperanto-movado Togolanda. La kreo en oktobro 1986 de la klubo Nova Sento, kiu anstataŭas la klubon ATE, relanĉis la tutan movadon. Nova Sento estas la baza ĉelo de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE), kiu naskiĝis la 21an de marto 1987 dank' al klopodoj de s-roj Afantchao-Biakou Yao, Attiogbe-Agbemadon kaj Gbeglo Koffi. UTE ne estu sekreta, kaŝita asocio; ĝi devas esti konata de ĉiuj kaj agnoskita de la ŝtato Togolanda. Ni demandis nin: Kiel atingi tion?

Per klopodoj de s-roj Attiogbe-Agbemadon kaj Gbeglo Koffi, UTE sukcesis kontakti la nacian komisionon pri Unesko. La sekretario de tiu komisiono devis klarigi, ke UTE estos agnoskita de la registaro, nur se ĝi estos Unesko-klubo Esperanto. Temas ja pri klubego, kiu havu kiel sekciojn la Esperanto-klubojn de la lando. Nomo tute ne gravas, ĉar ĝi estas io formala, konvencia. La propono de s-ro Adodo Afandémon, la sekretario de la nacia komisiono pri Unesko, estis plene akceptita. De tiam, UTE havas konkretajn rilatojn kun tiu komisiono, kiu disponigas en sia biblioteko breton al UTE por eksponi Esperantajn librojn.

La sola vojo malfermita al la asocio estas la aliĝo al FTACU (Federacio Togolanda de la Asocioj kaj Kluboj de Unesko [Ftakuo]). Pli ol dek sinsekvaj dimanĉaj kunvenoj

de UTE-anoj permesis al la esperantistoj aranĝi programon kaj fiksi daton por la solena ceremonio. "Informi la togolandanojn pri Esperanto" estas la ĉefa punkto de la programo, ĉar demandoj ĉie farataj pri la lingvo montras, ke multaj scias nenion pri Esperanto. Tial UTE planis aranĝi ekspozicion, kaj petis de Esperantaj organizaĵoj kaj unuopaj volontuloj, ke ili sendu al ĝi afiŝojn, kasedojn, librojn, glumarkojn ktp. Menciindas, ke SAT-Amikaro, UFE, UEA, Centre Culturel Agevin d'Esperanto kaj unuopuloj kiel Marcel Delforge, Hans Bakker, Jean-Paul Beau kaj Raymonde Perault grandskale kontribuis, sendante la petitajn esperantaĵojn.

La ceremonio okazis la 22an de aprilo 1988 en la lernejo "Collège Protestant de Lomé" (Kolegio Protestanta de Lomé). Jam je la kvina posttagmeze, la amfiteatro estis plenplena pro la elsendoj faritaj de s-ro Afantchao-Biakou en la radiostacio de Lomé la 26-an de marto kaj la 16-an de aprilo. Esperantistoj kaj scivoluloj okupis ĉiujn seĝojn de la ĉambrego: la unuaj intencis respondi la demandojn de la aliaj. Kelkajn minutojn post la kvina alvenis la reprezentanto de la Ministro pri Kulturo, s-ro Méyéba Ketehouli, kaj aliaj altranguloj, inter kiuj s-ro Adodo, la sekretario de la nacia komisiono pri Unesko, kaj s-ro Lonlon Dzedzikou, la prezidanto de Ftakuo.

Unue la pastoro Alou, la viclernejestro de la Kolegio Protestanta, bonvenigis la partoprenantojn. En sia

Sube: La inaŭgura estraro de Unesko-klubo Esperanto pruvis la efikon de kunagado. S-roj Attiogbe-Agbemadon kaj Gbeglo Koffi troviĝas meze, antaŭ la pordo.



parolado, li malkaŝis sian nescion pri Esperanto: “Mi ne hontas, asertante al vi, ke mi sciis nenion pri Esperanto. Tiu ceremonio, kiun mi estas malfermanta, permesis al mi malkovri, ke Esperanto estas gravaĵo. Mi petas de la Estraro de UTE, ke ili helpu al mi frue esperantistiĝi.” Sekvis la parolado de s-ro Attiogbe-Agbemadon, la prezidanto de UTE, en kiu li skizis la historion de la lingvo kaj de la Esperanta movado en Togolando. Fine li emfazis, ke Esperanto luktas por mondpaco, alvokas ĉiujn popolojn revalorigi sian kulturon kaj strebas al observigo de la homrajtoj en la mondo.

La parolado de la prezidanto de Ftakuo estis la plej miriga kaj grava, ĉar kiu povis diveni, ke tiu ne-esperantisto sukcesos tiagrade propagandi Esperanton, alte taksante ĝiajn esencojn. Jen epitomo: “Kulturo estas pli facile vivebla ol difinebla. La bazo de ĉiu kulturo estas lingvo. Tial, instruante siajn lingvojn al afrikanoj, la koloniistoj trudis siajn kulturojn. Ili asertis, ke Afriko ne havas lingvojn sed dialektojn, kaj sekve nenian kulturon ili posedas. Bonŝance, la registaroj de Afrikaj landoj frue komprenis, ke ili devas revalorigi sian kulturon; tial ili lernigas kaj evoluigas siajn lingvojn naciajn. Se la problemo lingva estos tiel solvita ene de la afriklandoj, kio pri la lingvo por internacia kontakto? Ne sufiĉas nur nomi lingvon internacia,

sed tia lingvo estu internacia per sia strukturo, estu facile lernebla por la homoj en la tuta mondo, ne apartenu al iu grupo: ĉiuj tiuj ecoj troviĝas en unusola lingvo, Esperanto, kiu enhavas karakterojn de la lingvoj afrikaj kaj alikontinentaj.”

UTE estas definitive kaj oficiale enoficigita. Necesas menciigi nomojn de kelkaj UTE-anoj, kiuj streĉis siajn fortojn por tiu celo; ili estas s-roj Afantchao-Biakou Yao, Agbolo Messan, Attiogbe-Agbemadon Mensah, Gbeglo Koffi kaj Hounkanli Agbeko Kouami, kies klopodoj kontribuis al la sukceso de la solenaĵo. UTE dankas ĉiujn, kiuj helpis al ĝia enoficigo: krom la supre menciitaj, ankaŭ aliajn francajn esperantistojn, nome Leo Lentaigne kaj Roland Levreaud, dank’ al kiuj la Esperanto-movado Togolanda fartas nun bonege.

UTE profitas la okazon por inviti ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj volontulojn helpi al ĝi trafi sian ĉefan celon, disvastigi Esperanton en la tuta Togolando. Ĝi antaŭdankas ĉiujn, kiuj sendos esperantaĵojn por la biblioteko kaj helpos al ĝi solvi sian problemon ĉefan, la mankon de propra oficejo.

Gbeglo Koffi
Sekretario de UTE
B.P. 13169, Lomé, Togo

Subtenu movadan monumenton en Litovio!

La unua lernolibro de Esperanto povis aperi en 1887 dank’ al loĝanto de la litova urbo Kaunas. La komercisto Aleksandro Zilbernik, kies bofilo la juna Zamenhof farigis en marto de tiu jaro, donacis dek mil orajn rublojn al li kaj Klara, grandparte uzotajn por la afero Esperanto.

La gesinjoroj Zamenhof ofte vizitis Kaunas en la jaroj 1885-1890. La domo de A. Zilbernik konserviĝis ĝis hodiaŭ, kiel numero 5 en malnovurba strateto kiu nun portas la nomon L. Zamenhof. Laŭ la sovetia sistemo, tiu domo pro sia unika ligiteco al Esperanto estas proklamita kiel historia monumento de loka signifo (ekzistas krome la niveloj respublika, tutsovetia kaj internacia signifo). Nun en la dometo troviĝas kelkaj loĝejoj, sed ĝia stato estas preskaŭ katastrofa kaj laŭ nia scio oni baldaŭ devos parte rekonstrui ĝin.

De 1984, la litova filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj havas projekton pri utiligo de la domo. Oni intensas tie fondi regionan Esperanto-centron, kiu konsistu el la jenaj fakoj: muzeo, litova Esperanto-arkivo, biblioteko, klasĉambroj, ejoj de kelkaj Esperanto-kluboj el Kaunas kaj sidejo de la litova filio de ASE. Intertempe oni promesis al ni la unuan etaĝon (4 ĉambroj), sed sur la dua kaj tria etaĝoj oni planas restigi loĝejojn.

Ni opinias, ke tia stato ne povas kontentigi la esperantistojn. Estos unika okazo post la riparoj plene ligi la tutan domon al ĝia historia signifo. Ĉiuj individuoj kaj organizaĵoj, kiuj ne estas indiferentaj al nia komuna afero, al fontoj kaj radikoj de la movado, bonvolu montri vian apogon skribante al la jenaj decidrajtaj instancoj, ĉu en Esperanto, ĉu en iu ajn nacia lingvo:

1. Kauno m. LDT vykdomasis komitetas (Plenumkomitato de Kaunas) - 233 671 Kaunas, Laisves al. 96, Litova SSR, Soveta Unio.



2. Lietuvos TSR kultūros ministerija (Ministerio de kulturo de Litova SSR) - 232683 Vilnius, J. Basanavičiaus 5, Litova SSR, Soveta Unio.

3. Lietuvos TSR Ministru Taryba (Konsilantaro de ministroj de Litova SSR) - 232039 Vilnius, Lenino a. 2, Litova SSR, Soveta Unio.

Litovaj esperantistoj

Granda terminaro markas fervojistan kongreson en Francio


Ĉe la 40-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) en Perpignan de la 4-a ĝis la 11-a de junio, la Terminara Komisiono prezentis fervojan terminaron kun 10 204 fakvortoj kaj -esprimoj en Esperanto. Por ĝia realigo laboradis specialistoj el 14 landoj dum pli ol 30 jaroj. Ĝi formas suplementon al ĝenerala fervoja terminaro, kiun eldonas la Internacia Fervoj-Unio (UIC) en ses lingvoj: franca, germana, angla, itala, hispana kaj nederlanda. Ĉe la kongreso, la komisiona gvidanto Gernot Ritterspach solene transdonis la manuskriptan kajeron al estraranoj kaj komitatanoj de IFEFF; broŝurita eldono estas en preparo. Al tiu sukceso grave kontribuis Heinz Dieter Hartig, la redaktoro de *Terminara kuriero*, kaj prave li estis distingita per la Ora Medalo de la internacia fervojista kultura organizaĵo FISAIC.

La tutsemajna kongresprogramo disvolviĝis discipline kaj senhaste en la "Palaco de Kongresoj", inda kadro por la tre variaj prezentadoj kaj kunsidoj. Aparte menciindas la ĉeftema prelego de Georges Mazaud pri la rapidtrajno TGV-A, kaj la tradicia prezentaĵo de "Fervojaj aktualaĵoj el diversaj landoj". Funkciis radioamatora stacio kiu havis 167 kontaktojn kun sume 17 landoj. Allogaj ekskursoj kompletigis la aranĝon, al kiu aliĝis 553 partoprenantoj el 19 landoj.

IFEFF laŭstatute elektis por dujara oficperiodo novan estraron. Demisiis vicprezidanto Per Engen (Norvegio); lin anstataŭas István Gulyás (Hungario). Reelektitaj estis la ceteraj estraranoj. Novaj landaj asocioj aliĝis el GDR kaj Ĉinio; IFEFF do havas nun 21 landajn asociojn aliĝintajn.

G. Ritterspach (FR Germanio)

IFEFF-estraranoj kaj komitatanoj ĉe urbodoma akcepto.



Poloj honoras siajn pionirojn

Festo de Grabowski-Jaro, lanĉo de Fondumo Zamenhof

La Reĝa Kastelo en Varsovio gastigis ne nur ducenton da esperantistoj sed ankaŭ la polajn vicministron pri kulturo kaj parlamentan prezidanton, en ceremonio la 4-an de junio kiu solenis la Jaron de Grabowski kaj la oficialiĝon de la Fondumo Zamenhof. La Estraron de la Fondumo konsistigas dek tri reprezentantoj de Esperantaj kaj polaj organizaĵoj. Ili havas la taskon havigi la financajn rimedojn kaj gvidi la konstruon de la Centro Zamenhof en Bjalistoko.

Inter la estraranoj estas UEA-prezidanto Humphrey Tonkin, kiu en sia parolado ĉe la ceremonio klarigis la dubojn pri la Centro unue sentitajn de multaj movadanoj. "Post cent jaroj da ignoro kaj perditaj esperoj, ni emas tro skeptiki antaŭ novaj okazoj." Sed li substrekiis la kreskantan akcepton kaj entuziasmon por la iniciato inter la esperantistaro. En posta kunsido de la Fonduma Estraro, la parlamenta prezidanto Malinowski pledis por konkreta financa subteno de la internacia movado, ne tiom per grandaj sumoj kiom per multaj donacantoj: "El malgrandaj rojoj kreskas grandaj riveroj." Ĉe la UK en Roterdamo okazos publika kunveno pri la Centro Zamenhof, kie eblos pli

detale aŭdi — i.a. de Malinowski mem — pri la preparlaboroj kaj la planoj por ligi la Centron al internacia publiko.*

La semajnfino cetere dediĉiĝis al la amiko kaj kolego de Zamenhof Antoni Grabowski, per prelegoj kaj diskutoj, du koncertoj, ĉarma, efika resumprezento de *Sinjoro Tadeo* fare de Studio P en Toruń, kaj reinaŭguro de memortabulo al Grabowski en lia iama loĝstrato. Familianoj de "la patro de la Esperanta poezio" ĉeestis plurajn el la aranĝoj; lia nepo Zigmund Kruszewski eĉ rakontis pri liaj personaj trajtoj kaj vivo kadre de eta seminario. Tie krome parolis H. Tonkin, interalie pri enigmaj lingvaj eraroj en *La neĝa blovado* kaj *El Parnaso de popoloj*, bulgaro Georgi Miĥalkov pri la influo de Grabowski je postaj E-poetoj, kaj polo Tyburcjusz Tyblewski pri la demandaro, kiun Grabowski plenskribis en 1906 por la Lingva Komitato.

*Daŭre ekzistas speciala konto ĉe la Centra Oficejo en Roterdamo por grandaj aŭ malgrandaj mondonacoj: indiku "E-Centro Bialystok". Nomoj de donacintoj aperas en la rubriko "Oficiala Informilo".

Valoris lerni en Japanio

Oomoto estas religia movado, kiu devenis el la ŝintoismo. Unu el ĝiaj plej simpatiaj trajtoj estas la toleremo al aliaj mondkonceptoj. Ĝia filozofio ankaŭ enhavas la ideon pri komuna mondlingvo. Multaj oomotanoj opinias, ke ĉi tiu komuna lingvo povas esti Esperanto. Pro tio Oomoto estas malavara financa kaj morala subtenanto de nia movado.

La kunfondinto de Oomoto, s-ro Onisaburo Deguchi, instruis: "Arto estas patrino de religio." Oomoto instigas respekton al la tradiciaj artoj kaj kulturo en Japanio. Ekde 1976 regule okazas internaciaj seminarioj en la urbo Kameoka, kie la administra sidejo de Oomoto troviĝas. Ĉi tiuj anglalingvaj seminarioj konigas japanajn tradiciajn artojn al eksterlandanoj.

La menciita seminario la unuan fojon okazis en Esperanto ĉi-jare, inter la 12-a kaj 26-a de majo. Partoprenis ĝin 5 esperantistoj el Brazilo, Hungario, Nederlando, Svedio kaj Svislando. Ni konatiĝis kun no-danco, te-ceremonio, skerm-arto, kaligrafio kaj potfarado sub la gvido de majstroj. Ĉiun unuopan partoprenanton helpis aparta asistanto. Ĉiutage okazis kvin 80-minutaj lecionoj. Krome ni aŭskultis prelegon kaj spertis prezentadon pri floraranĝo kaj akupunkturo. En la vesperaj programoj ni ĝuis la tradicion japanan muzikon. Ni vivis laŭ la japana maniero uzante japanajn tradiciajn vestojn, kaj ni loĝis en japanaj tradiciaj ĉambroj. La majstroj kaj asistantoj ne lasis nin multe ripozi: en la interlecionaj paŭzoj ni estis okupataj kurante hejmen kaj ŝanĝante la kimonojn. Kvankam la kursoj estis fizike elĉerpaj, ili ege valoris la penon. Ŝajnas, ke post tiuj intereseĝaj du semajnoj ni komencis



kompreneti la japanan pensmanieron kaj la kaŭzojn de la japanaj sukcesoj.

La unua esperantlingva seminario estis provo. Mi esperas, ke la organizantoj okazigos ankaŭ estonte la esperantlingvan seminarion kaj ke aliaj esperantistoj havos la saman eblon travivi lernigajn tagojn en Kameoka.

Flóra Szabó-Felső (Hungario)

Brazila ekumenisma organizaĵo pli uzos Esperanton

Legio de Bona Volo (LBV) estas eduka, kultura, bonfara, filantropia, neŭtrale religia institucio, konsiderata en Brazilo publike utila. Ĝi estis fondita de Alziro Zarur (1914-1979) en la urbo Rio de Janeiro la 1-an de januaro 1950.

Kvankam je la tempo de tiu inaŭguro la fondinto mem ne konis la homaranismon, tamen li revis pri la proksimiĝo de ĉiuj homoj apartenantaj al kia ajn religio aŭ filozofia sistemo. La LBV-statuto tre favoras Esperanton kaj inter la celoj de tiu organizaĵo tekstas: "Laboradi laŭ siaj eblecoj por la kleriĝo de la popolo, stimulante edukadon laŭ spirita principoj, tre supere al la nekonsekvenca instruado, kaj pledi por la deviga instruado de morala scienco kaj de la lingvo Esperanto".

Efektiva laboro por nia lingvo tie komenciĝis pere de Radio Mundial (Sendostacio de Bona Volo) en 1956 je la tempo de prof. Torres Pastorino, kiu lerte prezentis la tiaman "Vamos aprender Esperanto?" (Ĉu ni lernu Esperanton?). Tiutempe diversmaniere kunlaboris kun la programo la eminentaj Ismael Gomes Braga, Porto Carreiro Neto, Braz Cosenza kaj la juna Jorge das Neves.

Okaze de la forpaso de Alziro Zarur en 1979, fariĝis la nova Direktoro-Prezidanto de LBV la ĵurnalisto kaj radiisto José de Paiva Netto, sub kies granda administra kaj spirita efikeco Legio de Bona Volo gigantiĝas jaron post jaro tiamaniere, ke ĝi havas nuntempe 32 filiojn kaj centojn da sidejoj en Brazilo, same kiel 5 filiojn eksterlande (Argentino, Bolivio, Paragvajo, Urugvajo, Usono).

La malnova sendostacio ne plu apartenas al LBV, tamen ekzistas PBV, "Programa Boa Vontade" (Programo Bona Volo), kies elsendoj ĉiutagaj okazas pere de 283 radiostacioj aldone al 83 televidaj prezentoj.

Nuntempe Legio de Bona Volo subtenas 144 vartejojn por malriĉaj infanoj, 66 ejojn por kuracista-dentista kaj apoteka asistado, dek metiajn kursojn, ses hejmojn por gemaljunuloj, du lernejojn por alfabetigado, unu hejmon por agro-industria trejnado kaj dekon da grupoj, kiuj iras tra la stratoj de grandaj urboj por helpi almozuojn, disdonante tute senpage nutraĵojn kaj vestojn.

La influhava revuo *Veja* (Vidu) reliefigis, ke "pli ol 70% de la monrimedoj de LBV estas destinitaj al ĝia laboro de asistado al senhavuloj en la tuta lando, dum oni scias, ke la

Radikalaj ŝancoj

Troviĝinte en Romo kiel turisto, hazarde mi partoprenis la 28-an de marto 1988 en surstrata manifestacio antaŭ la sidejo de la nacia televido RAI, kie mi fotis grupon de Esperantaj manifestaciantoj. Demandinte, mi eksciis, ke organizis la aferon la roma sekcio de "Esperanto" Radikala Asocio (ERA) por peti debatojn pri la eŭropa lingva problemo: Ĝuste ĉar RAI neniam alfrontis ĝin, laŭ la ĉeestantaj radikaluloj, neniuj en Italio komprenas ties gravecon aŭ konscias pri ties pezaj konsekvencoj.

Sed kio estas ERA? Ĝi estas asocio de radikaluloj, stariĝinta interne de la (itala) Radikala Partio (PR) la 25-an de aprilo 1987, tiam konsistanta el kelkaj esperantistoj kaj el trideko da simpatiantoj, ĉiuj italaj. En tiu sama jaro PR decidis doni (inter siaj celoj) prioritaton al la solvo de internaciaj problemoj (kreo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo), kaj por pli bone tion atingi ĝi multe penis havigi al si tuteŭropan membraron: fakte, multaj eksterlandanoj partoprenis en la sekvanta nacia kongreso de PR en januaro 1988, kaj tiam la (itala) Radikala Partio oficiale fariĝis Transnacia Radikala Partio.

Dum tiu kongreso, okazinta en Bolonjo, rezulte de grandskala informado pri Esperanto kvindek da novaj radikaluloj aliĝis al ERA. Inter ili estis ankaŭ 6 eksterlandanoj el kiuj neniuj, bedaŭrinde, tiam kapablas paroli en Esperanto. Tio klarigas kial, kiam ERA proponis al la kongreso aldoni Esperanton al la aliaj 3 oficialaj lingvoj de la partio (itala, franca kaj angla), la kongreso malaprobis la

plimulto de la samcelaj institucioj elspezas preskaŭ la tuton de siaj enspezoj por funkciulaj salajroj."

Kio rilate al Esperanto?

Funkcias Esperanto-departemento duĉambra ĉe la monda sidejo de LBV en la urbo San-Paŭlo, sub la gvido de juna esperantisto Mário Luiz Bosso kun la helpo de alia junulo, André Tiago. Krom tio oni planas starigi sekciojn en ĉiu LBV-filio tra la tuta lando. Vi povas plie informiĝi, mendante ekzempleron de *Meditadoj kaj pensoj*, verko de Paiva Netto ĵus eldonita kaj esperantigita de prof. Walter Francini, UEA-delegito en San-Paŭlo, aŭ petante prov-ekzempleron de *Ĵurnalo de LBV*, dumonata revuo 16-paĝa en Esperanto. Skribu rekte al Legio de Bona Volo, Esperanto-departemento, Av. Rudge 700, Bom Retiro, BR-01134 São Paulo (SP), Brazilo.

Temas pri fruktodona grundo, kies tre aktiva junularo povas esti la estonteco de nia landa movado. Tamen ni dependas de ĉies interesiĝo. Je la tempo de Alziro Zarur nia "organizita movado" ne kapablis profiti de tiel bela ŝanco kaj la tiama agado ĉesis. Ĉu nun ripetigis la sama "verda fiasko"? Aktiva neŭtraleco povas esti la vojo al pli larĝaj horizontoj, kie kreskos konsiderinde la internacilingva afero.

Jorge das Neves (UEA-ĉefdelegito)

proponon: al kiu paroli en Esperanto, se neniuj eksterlandano parolas ĝin?

Sed la partio kongresas ĉiujare, kaj ĉiujare oni rajtas proponi ŝanĝon de la statuto. Ĉar interne de la transnacia partio la lingva problemo restadas nesolvita, el tio sekvas la urĝa neceso, ke pliaj esperantistoj — ĉefe de la ŝtatoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo — aliĝu al la Transnacia Radikala Partio, kaj interne de ĝi al la "Esperanto" Radikala Asocio.

Kompreneble, estas aparte bonvenaj: 1) tiuj esperantistoj, kiuj deziras la forigon de la naciaj politikaj limoj; kaj 2) tiuj espeantistoj, kiuj deziras kontribui al la historia oficialigo de Esperanto, interne de la sola partio kiu sin devontigis batali por la eŭropa politika unuiĝo.

En Francio, Germanio kaj Nederlando ankoraŭ ne ekzistas naciaj sekcioj de la nova radikala partio: tio signifas, ke sufiĉas deko da esperantistoj, en ĉiu el la diritaj lan-



doj, por krei tie sekciojn, kiu ekde sia naskiĝo uzados Esperanton en ĉiu kunveno aŭ kongreso de la transnacia partio. Interesatoj bv. sin anonci al la sekretario de "Esperanto" Radikala Asocio, d-ro Alberto Menabene, Via Monti Sibilini 3, I-00141 Roma.

Karl-Heinz Renschler (FR Germanio)

MEM ekrekonstruas sin

Glasnost (publikeco) kaj *perestrojka* (renovigo), mondkonataj terminoj intertempe, ne preterpasis la Mondpacan Esperantistan Movadon (MEM), kies 11-a ĝenerala konferenco okazis fine de aprilo en la hungara ĉefurbo Budapeŝto. Pli ol 200 pacaktivuloj el 18 landoj, inter ili reprezentantoj de Kubo kaj Vjetnamio, ne avaris je kritiko kaj memkritiko pri la laboro de tiu ĉi tradicia esperantista fakorganizo pri paco.

El la trijara periodo de post la lasta ĝenerala konferenco, MEM povis raporti pri diversaj kontentigaj kaj sukcesplenaj agadoj. Inter ili estas menciinda la bulgara MEM-sekcio, kiu kolektis pli ol centmilon da subskriboj ĉe la "apelo el Hiroŝima kaj Nagasaki por la tuta malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj". En Ĉeĥoslovakio la tradicia renkontiĝo en Pardubice iĝis internacie rekonata kaj

ŝatata kunveno de pacamikoj. La sovetia MEM-sekcio ne nur povis inviti al la granda internacia konferenco en Volgograd, sed konstante kaj amase partoprenis en lokaj kaj tutlandaj porpacaj aranĝoj. En Rostov-ĉe-Don, Jalta kaj Samarkand okazis ekspozicioj, al kiuj esperantistoj el diversaj landoj sendis kontribuojn.

La ĉefa kritikinda afero en la laboro de MEM estis la mizera stato de ĝia revuo *Paco*. Ĝi malbone funkcias en sia rolo kiel la ekstera vizaĝo de la organizaĵo, ĉar tiu ĉi vizaĝo estas aĉa kaj malmoda. Ke la stilo kaj enhavo de la revuo ne plu kongruas kun la bezonoj de la hodiaŭa pacmovado, esence konsentis la reprezentantoj de la diversaj landaj sekcioj.

La malforta situacio de MEM en la okcidentaj landoj malfacile estas ŝanĝebla sen interesa kaj legenda revuo. La kritikantoj substrekis, ke ne sufiĉas la ripetado, ke ĉiu

homo, viro, virino, patro, patrino, infano, hundo kaj kato bezonas "la pacon" por vivi, kaj ke ĉiuj devus eĉ "batali por paco". Estas necese ilustru la porpacajn aktivojn per vivaj ekzemploj el la tuta mondo, kaj eviti tro militisman terminaron.

La dezirata redakcia plijunigo, kies simbolo estas la juna bulgarino Veneta Baleva, kaj la promeso de la ĉefredaktoro Violin Oljanov respekti la kritikon, estas esperigaj. La redakcio nun akceptos pli vastan spektron da opinioj kaj ideologiaj pozicioj. La 11-a ĝenerala konferenco de MEM atendis kontribuojn de ĉiuj pacaktivuloj, kiuj reprezentas la plej diversajn opiniojn pri la problemoj de paco, pacifismo kaj kontraŭmilitismo.

La "rekonstruo" de MEM bedaŭrinde ankoraŭ ne evidentiĝis per personaj ŝanĝoj, sed sole per la provo adapti la agad- kaj labormanierojn al la bezonoj de la pacmovado en

SEMINARIOJ


Ne nur instrui, sed eduki

La 6-a Internacia Metodika Seminario okazis inter la 20-a kaj 24-a de aprilo 1988. Kvankam jam la sesa, do preskaŭ tradicia, ĝi organiziĝis la unuan fojon en Ĉeĥoslovakio, nome en sudmoravia urbeto Strážnice. (Malmultaj el la partoprenantoj antaŭe sciis, ke ĝuste en tiu ĉi urbeto travivis siajn infanajn jarojn la "patro" de la pedagogoj, Komenio, kies statuo troviĝas sur la placo.) Partoprenis ĉirkaŭ 40 instruistoj el 6 landoj, precipe el Ĉeĥoslovakio; por tiuj ĉi estis la seminario fakte bonvena kaj utila okazo diskuti kun kaj lerni de siaj eksterlandaj kolegoj.

La unuan tagon oni prelegis kaj diskutis pri ĝeneralaj aferoj. Komence Zsuzsa Barcsay resumis la historion de IMS-oj, kiuj jam okazis en Pollando, Hungario kaj Bulgario. Sekvis interesa raporto pri du kvinlandaj instru-eksperimentoj, prezentita de Dan Maxwell. Till Dahlenburg prelegis pri ĝenerala klerigado kaj ĝia ligo kun Esperanto-instruado: temo, kiu montriĝis sufiĉe grava. La psikologian aspekton de la instruprocezo pritraktis Achim Zettier.

La sekva grupo de prelegoj konkrete montris diversajn instrumentojn kaj ilian praktikan aplikon en la instruado, nome divers-tipajn testojn (prelego de Márta Kovács) kaj precipe modernajn kaj interesajn komputilajn programojn (Ilona Koutny, Katalin Kisfaludy, Miloš Bloudek kaj Josef Vojáček). Oni povis sperti ankaŭ aŭdvidan kurson por progresintoj fare de Stano Marček. Pri metodologio kaj didaktiko de la instruado parolis Irena Szanser kaj Pavla Jodasová, praktike kaj amuze prezentis siajn instrumentojn Linhart Rýznar, Stefan MacGill kaj Ivanka Spasova.

Dum la tria prelegtago oni sciiĝis pri la spertoj de instruistoj, kiuj gvidas korespondajn kursojn kaj t.n. "klubojn de internacia amikeco" ĉe lernejoj kaj pioniraj domoj (Miroslav Malovec, Jan Řepa). La prelego de Magda Šaturová informis pri la postulata enhavo de dulingvaj vortaroj, kiuj ege utilas por ĉiuj studentoj kaj instruantoj. Oni laŭtleĝis la prelegon de Cao Donhai



Streĉa atento en Ĉeĥoslovakio (supre) kaj Svedio (dekstre).

pri komparado kaj induktado de gramatikaĵoj por progresintoj, kaj fine oni diskutis pri la eblecoj enkonduki Esperanton en lernejojn.

Fine de la seminario oni konstatis, ke la instruado de Esperanto bezonas rilati, kiel cetere la lingvoinstruado ĝenerale, ankaŭ al la klerigaj celoj de edukado. Tial oni proponas kiel ĉeftemon de la venonta IMS "Lingvopedagogiaj aspektoj de Esperanto-instruado" kun pli specifaj subtemoj (lingvaj komparoj, lingvaj scioj, plivastigo de ĝenerala klereco). Ni do espereble renkontiĝos venontan aprilon en Poprad, Slovakio.

V. Barandovská (Ĉeĥoslovakio)

Virinoj kune en Svedio

"Kune por la estonteco" estis la temo por internacia seminario en Björkshult, ĉarma loketo en sudorienta Svedio, de la 26-a ĝis la 29-a de majo. Partoprenis 24 virinoj kaj 3 viroj el 8 landoj. Aranĝintoj estis la Komisiono por Virina Agado (KVA), la sveda studorganizaĵo Vuxenskolan kaj la virina sekcio de la Centropartio en la gubernio de Kalmar, kies reprezentanto

la 90-aj jaroj. Jam estis draste reduktita la teda laŭtlegado de salutvortoj kaj raportoj. Oni al kutimiĝis libere paroli, sed tio ne signifas ke ĉiuj jam aŭdacas ĉion publike diri. Tamen ne estas unikaĵo de MEM, ke multaj gravaj interparoloj okazas en la koridoroj, ĉe la manĝotablo, en la trinkejo aŭ en la hotelĉambro.

La konferenco honorigis la laboron de la ĝisnuna estraro kaj reelektis ĝin sen konsiderindaj ŝanĝoj. Restas la problemo, ke malabundas junaj aktivuloj, kaj en la estraro kaj en la internacia komitato. Sed tio estas problemo, kiun oni ne povas solvi per ordonoj. Tri jaroj estas la tempospaco ĝis la venonta ĝenerala konferenco, dum kiu periodo MEM havas la ŝancon montri, ke ĝi povas plenumi sian rolon kiel ligilo kaj peranto inter la internacia pacmovado kaj la Esperanto-movado.

Roland Schnell (Berlino)



Ulla-Britt Wahl kune kun SEF-estrarano Kerstin Rohdin iniciatis la seminarion.

Tre interesaj prelegoj pri la situacio de virinoj en orientaj kaj okcidentaj landoj estis prezentataj de Elsbeth Bormann el Hamburgo, prezidanto de KVA kaj aktiva politikisto. Prelegis ankaŭ Jadwiga Gibczyńska, pola aktorino el Krakovo; Maire Mullarney el Dublino, membro de la Eŭropa Unio por la Verduloj; kaj Ingrid Hasselström-Nyvall el Nybro, sveda parlamentano. Viglaj kaj altnivelaj diskutoj sekvis la prelegojn.

Parta celo de la seminario estis montri la utilecon de Esperanto, logante ne-esperantoparolantojn el eksteraj organizaĵoj partopreni internaciajn kulturajn aranĝojn. La seminario vekis intereson precipe inter pluraj instruistoj, kiuj povis konstati la facilecon de Esperanto kiam ili partoprenis Ĉe-metodan kurson sub la gvidado de la inspira Roterdama instruisto Audrey Childs-Mee.

Brila kultura evento dum la seminario estis piano-koncerto de la svisa pianisto Danielle Beguin. Ŝia virtuoza ludado provizis kadron por la teatraĵo *Sub la verdaj ombroj*, temanta pri la vivo de la virino de naskiĝo ĝis morto kaj prezentita de Jadwiga Gibczyńska.

Linnea Edsenius (Svedio)

MOVADA ORGANIZO

★ aŭ ☉ ?

Nuntempe, en la t.n. okcidenta mondo, la plimulto de la kulturaj societoj travivas ĝeneralan krizon. Ankaŭ la Esperanto-movado tie nur pene povas trovi novajn adeptojn. La societoj, kiuj tamen rapide kreskas plej ofte estas tiuj, kiuj aplikas la malkovrojn de studoj pri merkato kaj pri afergvidado.

Tradicie, ni konsultas kaj demokratie decidigas pri nia agadpolitiko pere de komitatoj. Tiel ni atentigas precipe pri la bezonoj de la tradiciaj membroj. Tamen, se ni volas konvinki novan publikon, ni devas ekkoni la bezonojn de tiu ĉi publiko kaj la rimedojn por altiri ilian atenton. Tio estas laboro por fakuloj, prefere ekstermovadaj. Nur en la *apliko* de iliaj ideoj evidentiĝas la demokratiemo: ĉu la estraro agas kun sufiĉe da malfermiteco por konservi ĝeneralan fidon; ĉu ĝi trovas la ĝustajn argumentojn por krei ĝeneralan entuziasmon inter ĉiuj aktivuloj? Por maksimume efikigi entuziasmon ankaŭ necesas klaraj reguloj kaj strukturoj en kiuj oni laboru.

Tiuj ĉi simplaj principoj, nome la konsultado de specialistoj ekstermovadaj, la konstanta interkonsiliĝo de estraro kun lokaj aktivuloj por harmoniigi la agadon sed la samtempa klara priskribo de la kadro en kiu oni devas agadi, ŝajnas al mi nete kontraŭaj al tre disvastiĝinta verdstelula tradicio, kies specifeco estas individuismemo, nefakuleco, agado sen interkonsiliĝo, laŭ propra inspiro kaj gusto.

Jam de 1986, ni iom post iom ŝanĝas la agadstrategion en Flandra Esperanto-Ligo laŭ la supre priskribitaj principoj. La rezultoj ĝis nun ne estis spektaklaj, sed la nombro de la membroj, kursoj kaj iniciatoj mezurable kreskis. La progreso sendube ankaŭ estas malrapida, ĉar neniuj estrarano estas specialisto pri merkato aŭ afergvidado kaj do ni ĉiuj mem devis iom post iom enprofundiĝi en la novajn sciojn.

Kiam ni konsciiĝis pri la neceso de fundamenta ŝanĝiĝo, ni ankaŭ sentis la bezonon pri uzo de nova simbolo, por konscie rompi kun la tradicio labori dise, ĉiu en sia propra anguleto, foje eĉ iom fremda ĝis malamika al la neesperantista mondo, kvazaŭ de el nia verda "bastiono". Tial FEL elspezis grandan monsumon por sia "domstilo": ni komplete renovigis ĉion, kio portas la nomon kaj la simbolon de nia agado kaj ni uzos la jubilean simbolon kaj la adaptitan letertipon ankaŭ post la Jubilea Jaro. Intertempe ni rimarkis ke diversaj landaj asocioj kaj ILEI, JEFO, TEJO, UEA kaj kelkaj aliaj organizaĵoj jam sisteme ne-uzas la pentagramon.

En FEL ni nun daŭre studas por havi pli klaran bildon pri niaj fortoj kaj malfortoj, por starigi pli kaj pli detalan laborplanon: ni volas difini niajn celgrupojn kaj decidi pri la uzendaj metodoj por varbado, pri la harmoniigo de la kursoj kaj pri la komuna ellaborado de Esperanto-servoj. Neniu povas certigi, kiuj estos la rezultoj de la efektivigo de tiu plano. Sed ja evidentas ke ju pli ni analizas, des pli granda fariĝas niaj ŝancoj je sukceso.

Ĉu ankaŭ vi sentas emon kune suriri tian vojon?

Ivo Durwael (Belgio)

La sekva artikolo komenciĝis kiel 20-paĝa eseo — tute alia ĝenro, ol la modestaj dumil-vortaj tekstoj kiujn ni foje enlasas ĉi tien. Sed pro ĝia karaktero de manifesto, kaj ĝia ankoraŭ malkutima deveno el la rapide vigliĝanta sovetia movado, ni subpremias niajn dubojn je du kaj duona paĝoj. Se vi ŝatus legi la originalon (kiu jam rondiras en kelkaj E-medioj), profitu de la aŭtora adreso ĉe la fino.

Survoje

Strategio: ĉu por E-komunumo?

“Vivi en ideo signifas trakti la neeban tiel, kvazaŭ ĝi estus ebla. — J. W. Goethe

Ni staras antaŭ la pordo, kondukanta for el la universo de nia izolo, nia en-si-mema fermiteco, nia nescio, survoje al la estonto. Ni tenas la manon sur la malfermilo, ne rimarkante forkuron de tagoj. . . . Kiom da tempo ni bezonas: ĉu momenton? jarcenton? Ni palpas aspretan malvarmon de la pordo, aŭdas la dampitan, kvazaŭ malproksiman rumoron de la ekstera tempesto, ni scias: farendas nur unu movo, nur unu paŝo. . . .

La Esperanto-komunumo, aŭ almenaŭ la plej granda parto de ĝia intelektularo, travivas nun la epokon de rekonsciigo el tradiciisma duondormo, la epokon de pli realeca kaj sobra pritakso de la esperantismo, de ĝiaj atingoj, kaj de sia propra rolo en la “Movado”.

Pri la frustracioj de la E-komunumano, kiu sentas sin sen-signifa kaj sen efektiva rolo, ĉar ja ĉion plenumas lianome nur la gvidantoj, lian rolon proklamas “sankta” kunveni unufoje semajne kaj paroli la “sanktan lingvon” kaj atendi la “tagon de la venko”, kiu sentas sin hontigita antaŭ la alia, “ekstera” mondo kaj ne kuraĝas paroli pri tiu sia “sankta” rolo, espereble parolos aliaj . . . (Zlatko Tišljarić)

Ni facile fanfaronas pri sukcesoj, kiuj nur estas guto en la maro, sen iu ajn efiko aŭ sekvo: izola traduko de iu oficiala teksto, buŝa afabla agnosko en iu oficiala, pro-cirkonstanco alparolo, ktp. Se ni farus seriozan ĝisfundan enketon pri la funkciado de multaj landaj asocioj, ni certe ne fierus! (Edward Symoens)

Internaciaj instancoj, kiel Universala Esperanto-Asocio, havas, kiel ĉefcelon grandskalan ensociigon de la lingvo kaj multe klopodas por efektivi tiun celon. Tamen malgraŭ iuj sukcesoj, la problemoj daŭre kontinuas, la proporcio nur moviĝas sur internacian skalon. La sukcesoj kutime estas efemeraj . . . (Baldur Ragnarsson)

La ekstero jam konstruis certan bildon, certan stereotipon pri la “fenomeno Esperanto”. Tiu stereotipo ne apartenas plej ofte al aparte favoraj, precipe pro la granda diferenco inter la celaro kaj propagandata utileco de Esperanto kaj la efektivaj ĝisnunaj rezultoj. (Jerzy Leyk)

Tiajn konstatojn ĉiu esperantisto facile povas daŭrigi surbaze de propraj spertoj kaj observoj, sed tiaj konstatoj ne apartenas al la speciale agrablaj, ĉar ili simptomas malsanon, sentigas mucidan atmosferon de nia fermiteco. Dum iu parto de la esperantistaro strute fermas la okulojn, celante eviti malagrablajn pensojn kaj plu dorloti belajn iluziojn; dum alia parto el la gvidantoj pro movadisma

vervo aranĝas sukcespropagandon, blovante el muŝ-reala atingeto sapvezikan elefanton de “sukcesego”, proklamante ĉeeston de montara aero en ilia loka ĉelo . . . la tria parto — kuraĝa, sobra, pensema — provas trovi la vojon al elirejo kaj malfermi la pordon. . . .

Kaj adeptoj de la tradicia servutismo kaj adeptoj de la subjekta “paradigmo” koincidas nun almenaŭ en unu vidpunkto: la pluekzisto de la esperantistaro dependas de plia, novstupa kvalito en niaj laboroj.

Nur la kvalit-centra vidmaniero kapablas solvi ankaŭ la “kvantajn problemojn”. (Sándor Révész)

. . . ne nur la nombron, sed ĉefe la kvaliton. Tion ni celu. Por nia komunumo estas eble nur kreski — aŭ malaperi. (Giorgio Silfer)

La movado de pioniroj nodu nur tiajn kontaktojn al la neesperantista publiko, por kiuj ekzistas la kvalita bazo. (Michael Behr)

Decidu efektivaj valoroj kaj kvalitoj, ne imagataj pretendoj. (Jerzy Leyk)

Do, la direkto evidentas: nia komunumo bezonas novajn integrajn fortojn (valorojn, kvalitojn) interne, kaj novajn altirajn valorojn por la “ekstero”. Pli adekvatas al tiu direkto la subjekta paradigmo, la “novtipa” internacia kulturo, proklamita kiel celo en la “Manifesto de Raŭmo”. Almenaŭ tial, ke *kulturo*, en la vasta senco de la nocio, estas pleja specifa manifestiĝo de homo, kiel *aktiva* estulo, kaj plivastigas ĝuste la terenon de aktivado por ĉiu E-komunumano, ne sole por lia gvidantaro. . . .

La plej grava kaj dinamika faktoro de kulturo estas kreado. Kapabloj de homo al krea agado estas unu el la plej esencaj, determinaj trajtoj de homo, distingantaj lin de la besta mondo. Ĉiu homo — en plia aŭ malplia grado, sed ĉiu homo — depende de la soci-historiaj kondiĉoj, estas kreanto. Potencialaj kulturaj valoroj, kaŝiĝantaj en homa estado kaj konscio, fariĝas aktualaj, realaj kulturaj valoroj nur pere de kaj dank’ al krea agado. Elformiĝo de komunumo, konsistanta el kreantoj — la plej grava faktoro de la interna dinamika strukturo de kulturo kaj ĝia progreso — jen la inda celo, konturanta la horizonton survoje al la nova internacia kulturo.

La histori-evoluajn limiĝojn kaj barojn por krea manifestiĝo de homo ni traktu espereble en alia artikolo. Koncerne limiĝojn sociajn (distingo de la historio nur relativa) ni konsciu, ke la ekzistantaj sociaj strukturoj trudas al la socianoj la kvazaŭ “denaske programitajn” sociajn rolojn, kaj puŝas homon al izoliteco, fermiteco en kadroj de tiu socia rolo (profesia, eduka, grupa, klasa ktp), kreante barojn, limojn por manifestiĝo de ĉiuj esence kreaj mensaj fortoj. . . .

Memvola kaj konscia aparteno al diaspora E-komunumo, integrita per hom-fratiga ideo, ebligas al homo pli adekvate kaj libere ĝui sian homan esencon interne de la komunumo, pro tiu simpla fakto, ke pluraj memfremdigaj faktoroj, limiĝoj kaj baroj, karakterizaj por ŝtatecaj strukturoj, forestas en diaspora komunumo. Tiu funkcio de la diasporo, t.e. mensa liberigo, kon-

siderinde evoluos, progresos kaj kreskos, kiam ĉiu komunumano konscios, ke dank' al aparteno al la komunumo li havos realan aliron al la trezoroj de la tutmonda kulturo, al identiĝo kun ĝi kaj ĝia formiĝo.

Ni agnosku, ke en la nuna evolustato de Esperantio la edukiteco, klero, intelekto de ĉiu esperantisto almenaŭ je 99% (eĉ por esperantoparolantoj) formiĝas ekster Esperantio, utiligante kulturajn valorojn de la "neesperantista mondo", kaj tiuj eduk-faktoroj estas influataj kaj gvidataj per kultur-politikoj de la koncernaj loĝ-landoj. . . .

La penson de esperantisto-intelektulo gvidas tiuj valoroj kaj ideoj, kiuj partoprenis en la formiĝo de lia individueco. Sed tiuj "gvidantoj" estas nevideblaj, diafanaj, ofte eĉ ne konsciataj. Tial renkonto, sinteziĝo de la gvidaj konceptoj en novkvalitan transnacion fenomenon, ja "teorie" okazas, sed la praktika efiko kaj rezultativeco de tia *nuna* renkonto mizeras, nulas. La lim-genera leĝeco daŭre elridetas sian malicon. Por ke tia sinteziĝo povu okazi kaj frukti, bezonatas minimume senkaŝa, maldiafana, libera renkontiĝo de gvidaj ideoj — grandio naskas grandon.

Al tiu amareta bildo ni aldonu, ke komuna lingvokodo ne garantias plenvaloran komunikiĝon kaj interkomprenon. . . . Interkompreniĝo okazas tiomgrade,



Vilmos Benczik kaj Giorgio Silfer: Se iliaj duboj pri la efektiva valoro de la Esperanta kulturo estas pravaj, kio fareblas por realigi ties grandan potencialon?

kiomgrade la komunikantoj jam havas komunan kulturan bazon, la komunan "ĉirkaŭtekston". La temo meritas apartan esploron, ĉar ĝi estas intime ligita al la arteco kaj estetika valoro de literaturo esperantlingva, kies legantaro (almenaŭ potenciale) estas la tuta mondo.

Kiam V. Benczik diras, "Mi timas, ke ni opinias pri nia poezio tre favore. Neniel ĝi samvaloras kun la nacilingvaj poezioj, se ni konsideras la kvanton de bonaj poemoj jare aperantaj. Kaj mi dubas pri la samvaloreco ankaŭ

koncerne la pintojn, verŝajne en ĉiuj naciaj literaturoj — almenaŭ en eŭropaj — ĉiujare naskiĝas minimume dekoj da poeziaĵoj, kiuj nepre superas kvalite la plej bonajn poemojn, jam verkitajn en Esperanto," li diras ion agnoskindan kaj kompletigendan per konfeso, ke la sama takso validas ankaŭ pli ĝenerale por ĉiuj valoroj de la Esperanta subkulturo. La amara ŝerco de Georges Lagrange, "La esperantistoj kutime malfruas unu aŭ du generaciojn rilate la tutmondan literaturon," ial ne vekas feliĉan rideton. Kolosa potenciala forto de Esperanto kiel kulturporta kaj kultur-pera fenomeno vegetis dum jaroj, jen pro la servutisma strategio (ĉefe!), jen pro manifestiĝo de la menciita lim-genera leĝeco, kun la sola ebla konkludo: La tutmonda kulturo de la "ekstero" kvalite (estetike, mense, forme) plu superas la nun ekzistantan Esperantan subkulturon. En tiu situacio, se ni pretendas superi la kulturon de la "ekstero" (kio estas reale ebla), ni, kiel la unuan paŝon, devas entrepreni pli aktivan kritikan asimilon de la pintoj el la tutmonda kulturo. La kondamnita tradukismo, kiu ĝis nun servis sole por lingvoesprima formiĝo, kaj en tiu funkcio efektive elĉerpiĝis, devas nun reviviĝi kun nova funkcio — partopreni en la ellaboro de la estetika korpo de nia literaturo. . . .

Ni povos diri, ke nia kulturo atingis konsiderindan progreson, kiam en ĝia sino aperos valoroj, dirantaj ion novan pri la homo, socio, universo, naturo, ne troveblan en naciaj kulturoj; kiam tiuj valoroj estos humanisme akcepteblaj; kiam tiuj valoroj estos kre-instigaj kaj kreogeneraj, kaj ebligos al la homo manifestiĝon de liaj kreaj potencoj; kaj havos sendiskriminacian disvastiĝon kaj disvastigeblon.

La Esperanta komunumo havas kolosajn potencojn kaj avantaĝojn kompare al iuj ajn naciaj kulturportantoj, kaj la Esperanta kulturo havas ĉion por fariĝi avangardo kulturoporta en monda skalo.

Temas pri ĝia kapablo neniigi, aŭ konsiderinde mildigi la manifestiĝon de la lim-genera leĝo karakteriza por ŝtatecaj strukturoj. Kluboj, rondoj, grupoj de esperantistoj relative rapide povas estiĝi kulturoportaj centroj, kie esperantistoj kaj la neesperantista publiko povos kontentigi la bezonojn je trovo de intelektaj, estetikaj, edukaj, klerigaj, artaj k.c. valoroj kulturaj je nacia, inter- kaj trans-naciaj kaj tutmondaj skaloj, kaj manifesti siajn kreajn potencojn, kontribuante al formiĝo de tiuj valoroj. Instruado de la lingvo estos esenca, sed ne la sola branĉo en la laboro de tiaj centroj. Scio de la lingvo ne potenciale, sed reale estos komprenata kiel identiĝo kaj alireblo al kulturo tutmonda, kaj esenca parto en memevoluo de homa personeco kaj kreivo; samtempe tiuj centroj kapablos funkcii kiel sociaj ĉeloj en Unuiĝo por Nova Internacia Kulturo. Kiel unua paŝo kapabla cementi, nutri tiujn centrojn kaj fortojn — kaj siavice esti nutrata de ili — devus esti transnacia periodaĵo: teoria, kultura, beletra. . . .

Ideale, la gazetaro estas spegulo de la intelekto, ekrano kie la komunumo vidas sian kontinuan kaj permanentan laboron, aktivejo por partopreni en tiu laboro kaj konsekvence por stimuli kaj intensigi la komunuman konscion. Kion unu intelekto aprecas en alia, estas antaŭ ĉio la eksplodo de nova ideo. Eble la ideo estos ne senerara — en la tereno de konceptado aktualas la sama regulo kiel en

juro: prefere publikigi dekon da eraraj ideoj, ol prisilenti unu veran (amnestii dek kulpulojn, ol kondamni unu senkulpan). La afero esencas ankaŭ en tio, ke eraraj ideoj, verŝajne, tute ne ekzistas: ekzistas pli aŭ malpli produktivaj.

Laŭ mi, tia teorieco de nia eventuala periodaĵo estas aktuale necesa, se ni volas en praktiko realigi la strebon al nova internacia kulturo. Ĉu paradokso, ke ni ĝenerale havas ne iun tutecan *teorion* de Esperanta literaturo, sed iun mozaikan grupon de apartaj priliteraturaj artikoloj? Sed, ĉu eble tiu mozaikeco de la teorio respegulas la esencan trajton — la mozaikecon, fragmentecon — de nia literaturo mem, kaj tiu siavice respondas al la mozaika strukturo — diasporo — de nia komunumo? . . . Tiu mozaikeco estas fekunda premiso por kvalita renovigo en iu ajn tereno de la vivo, scienco, arto ktp. Kvalitaj revolucioj ne okazas kiel unufrapa renversiĝo de tradicia sistemo, sed pli similas aperon de apartaj kaj malsamaj bobetoj en profundo de staranta aŭ fluanta akvo, kiuj fluas supren spite al la profundo, ĉiam pli multiĝas ĝis fine eferveski en nov-kvalitan strukturon. . . .

Artologio, psikologio de krea agado, *vivstrategio* de krea persono, *tradukologio, fonduso* de novaj ideoj . . . kaj . . . kaj . . . Ĉu la esperantistaro kompletigos la liston de la bezonataj rubrikoj pluse al la *beletro*, memevidente bezonata en tia periodaĵo-katalizilo survoje al nova internacia kulturo?

Aleksandr Fjodorov
Redaktoro de Literatura skatolo
SU-335045 Sevastopol-45, P.K. 19
Sovetunio

UNIKO 88

Ni konscias, ke la tutmonda kulturo dume superas la Esperantan subkulturon.

Ni scias, ke la Esperanta kulturo povas superi ĉian nacian kulturon, kaj fariĝi originala kultura avangardo, modelo por la tutmonda kulturo sen pretendo anstataŭi naciajn kulturojn.

Ni strebas al kulturo kapabla detrui katenojn de homa spirita mallibero kaj pioniri la vojon de progreso por la homaro.

Ni surpaŝas la vojon al tia kulturo: sendiskriminacia, humanisma, kreoplena.

Tiucele ni pretas:

- kritike asimili en E-kulturon ĉion valoran el ĉiuj kulturoj naciaj;
- zorgi pri sinteziĝo de tiuj valoroj en pli progresajn valorojn;
- krei kondiĉojn por libera krea manifestiĝo de la homo;
- kunlabori kun ĉiuj, kiuj akceptas niajn idealojn kaj la programon de UNIKO.

Unuiĝo por Nova Internacia Kulturo

Akceptojn, kontribuojn, proponojn oni sendu al la supra adreso.

LINGVO

Kiam ni nomas Esperanton vivanta lingvo, ni tamen ne forprenas de ĝi kelkajn ecojn netrovitajn (almenaŭ en tioma grado) ĉe aliaj lingvoj. Unu el tiuj estas planado: la konstanta serĉo de novaj teknikaj rimedoj ene de la lingva sistemo. Sed ne mankas kontraŭaj opinioj...

Pri la nomoj de monatoj kaj semajntagoj . . .

Instigite de la artikolo de s-ino Ŭusink-Nagata, "Lingvikaj vortoj en Esperanto" (*Esperanto*, dec. 1986), mi iam publikigis du proponojn en japana gazeto naci-lingve. La unua temis pri faciligo de la nomoj de monatoj. Esperanto prenas ilin rekte el la tradiciaj vortoj de okcidentaj lingvoj, kiel januaro, februaro ktp, kiuj viciĝas tute senorde kaj neregule. Ili postulas de multe da ne-eŭropaj komencantoj kroman ĝenon en la lernado de Esperanto. Ili devas parkerigi al si 12 specialajn radikojn kaj ilian vicon. Pro tio ofte trafas la lernantojn malfacilo kiel konfuzo inter *marto* kaj *mardo*, aŭ demando: "Kial septembro ne signifas la sepan sed la naŭan, kaj oktobro — la dekan?"

En malnova tempo, ankaŭ japanoj uzis senordajn, tamen poeziajn monat-nomojn, kiuj ankoraŭ estas uzataj en poemoj, hajkoj kaj utaoj. Sed de antaŭ pli ol 100 jaroj, kiam oni ŝanĝis la kalendaron de la luna al la suna, ili nomas la monatojn la 1-a monato, la dua monato ktp. Tiu nomado nun estas alprenita en multaj aziaj landoj pro sia simpleco. Kompare kun tiu, la metodo en Esperanto evidente estas tro komplika kaj malmoderna.

Laŭ tiu konsidero, mi kuraĝis proponi jenajn monat-nomojn: unuato, duato, . . . dekun(u)ato, dekduato, anstataŭ januaro, februaro ktp. La metodo utilas ankaŭ por skribi daton nur per ciferoj, ekzemple: 88-06-15 aŭ 891203.

Simile, la nomoj de la semajntagoj estas faciligendaj. Mia dua propono temis pri tio. Anstataŭ lundo, mardo ktp, oni nomu ilin kiel: semunujo, semduo, . . . semsepo, se oni konsentus akcepti la eksplikon pri *semajno* en PIV, ke ĝi komenciĝas de lundo.

Facileco en lernado, simpleco kaj racieco estas necesaj kondiĉoj de planlingvo. Mi kredas, ke la supraj proponoj multe helpas neeŭropanojn en la lernado de la du serioj da nomoj, kaj tial vaste akiras ilian konsenton, precipe ĉar tiuj estas ĉiutage multe uzataj vortoj.

Ŝiger Ujeki (Japanio)

. . . kaj de la alfabeto

"La problemoj restas solvota."
— Plena analiza gramatiko, §2

La alfabeto proponita de Zamenhof estas tre simpla kaj rapide lernebla. Dum praktika uzado ĝi tamen montriĝas iomete maloportuna, ĉar estas malfacile distingi inter la diversaj literoj kiam oni literumas.

Kiel oni povus transpaŝi de la "plej simpla imaĝebla" al io "pli ellaborita kaj praktika"? Ofta ero de naturaj lingvoj

ALFABETA KOMPARO

Nomo	Oficiala Sistemo	Sistemo Waringhien	Sistemo Belinfante	Sistemo Kalocsay	"Jerusalema Sistemo"	Hebrea Alfabeto	Araba Alfabeto	Greka Alfabeto
a	a	a	a	a	alfo	alef	alif	alfa
b	bo	ba	be	be	beto	bet	ba	beta
c	co	co	ce	ce	caro	(cadik)		
ĉ	ĉo	ĉo	ĉe	ĉa	ĉulo			
d	do	da	de	de	dalo	dalet	dal	delta
e	e	e	e	e	erno			
f	fo	fo	ef	ef	filo			fi
g	go	ga	ge	ge	greno			
ĝ	ĝo	ĝa	ĝo	ĝe	ĝipo		ĝim	
h	ho	ha	haĉ	ha	helo	he		(eta)
ĥ	ĥo	ĥo	ĥa	ĥi	ĥajo		ĥa	
i	i	i	i	i	ido			
j	jo	jo	jot	je	jumbo			
ĵ	ĵo	ĵa	ĵe	ĵi	ĵuro			
k	ko	ko	ka	ka	kufo	kaf	kaf	kapa
l	lo	lo	el	el	lambo	lamed	lam	lambda
m	mo	mo	em	om	memo	mem	mim	
n	no	na	en	en	nuno	nun	nun	
o	o	o	o	o	ogo			(omega)
p	po	po	pe	pa	peco	pe		
r	ro	ra	er	er	reŝo	reŝ		
s	so	so	es	es	sano	(sameĥ)	(sin)	
ŝ	ŝo	ŝo	ŝa	eŝ	ŝiro	ŝin	ŝin	
t	to	to	te	ta	tafo	taf	ta	taŭ
u	u	u	u	u	utro			
ŭ	ŭo	ŭo	ŭo	ŭo	ŭulmo			
v	vo	va	vi	ve	varto	vav	vav	
z	zo	za	zet	ze	zato	zain	zaj	zeta

kiu daŭre mankas en la planita Esperanto, estas nomoj. Parto de la vortoj de ĉiu lingvo konsistas el nomoj. Ili estas esenca parto de ĉiu lingvo, forte ligitaj kun ĝia spirito kaj kulturo.

Esperanto ne entute malhavas nomojn. Eĉ ĝia nomo havas tian devenon. Foje oni nomis nian lingvon "La Internacia" sed poste populariĝis la karesa "Esperanto" (laŭ la pseŭdonomo D-ro Esperanto). Ĉar nomoj estas ĉiam bezonataj por doni "koloron" al la lingvo, oni sentas kvazaŭ ian emon pliriĉigi Esperanton per ili.

Ĉu tio ne povus esti taŭga vojo por solvi nian problemon de alfabeto? Kial ne doni al ĉiu litero apartan, facile distingeblan *nomon*? Kelkaj lingvoj jam uzas tian sistemon, interalie la hebrea, araba kaj greka (kaj certe multaj pliaj). Kvankam la lernado de 28 nomoj prenis iom da tempo, foje lernitajn oni povus uzi ilin senerare kaj efike. Iom da komenca laboro baldaŭ estus rekompencita per plia klareco kaj taŭgeco. Tiamaniere ni iel liberigas nin de la principo de la "plej facile ebla" kaj adoptas anstataŭe tiun de la "plej taŭga kaj vivpova" solvo.

Kiel tiu alfabeto funkcias en la praktiko? La kemian formulon Na_2CO_3 oni nomas ekzemple "nunalf-du, caro, og-tri" ĉar ĉi tie oni bezonas la precizecon, sed P.O.K. oni senprobleme povus nomi "po-o-ko" kiel antaŭe ĉar ĝi estas ofte uzita kaj tiam venkas la parolrapideco (kompreneble taŭgus ankaŭ "pec-og-kuf").

Tiu ĉi nova sistemo venas ne por anstataŭi la zamenhofan, sed nur por kompletigi ĝin. Taskdivide oni povus uzi la alfabetan sistemon por nomi la literojn kaj la zamen-

hofan por difini iliajn elparolojn (la son-valorojn). Tian taskdividon oni jam trovas en la naturaj lingvoj kiuj uzas similajn sistemojn.

Male al aliaj proponoj plibonigi la Esperantan alfabeton (vidu PAG, §2), mia sistemo estas bazita, ne sur la modernaj eŭropaj lingvoj, sed sur la tri klasikaj, nome la hebrea, araba kaj greka. Komparante tiujn tri alfabetojn kun la nova esperanta, oni vidas ke nur al dek Esperantaj literoj (c, ĉ, e, g, i, j, ĵ, s, u, ŭ) mankas paralelaj antikvaj formoj. Ĉiuj ceteraj havas ian similecon, grandan aŭ malgrandan, kun iu el la klasikaj variantoj.

Jeremi Gishron (Israelo)

UN kaj ni

fariĝis

Mondo kaj ni

Nun eblas sekvi, per unu periodaĵo, la eksterajn rilatojn de UEA — ne nur en la koridoroj de UN kaj Unesko, sed ĉie kie ĝi reprezentas Esperanton antaŭ la ekstera mondo. Akiko Nagata (Beethovenlaan 6, 6865 EA Doorwerth, Nederlando) plu redaktas ĝin kaj atendas viajn kontribuojn. Abonu ĉe UEA (MJ-duono por 10 n-roj).

Festlibro estas fascina spegulo de la centjara Movado

Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Volumo II: Esperantismo. Red. José-Luis Melena Jiménez k.a. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. 790p. 25cm. Prezo: 120 gld.

La volumo *Esperantismo* de la omaĝlibro por Juan Régulo Pérez enhavas sesdekon da artikoloj, kiujn oni povas klasi laŭ tri temgrupoj: lingvistika, literaturistika kaj tria, kiu estas tre bunta kaj povus eble, kvankam ne ĉi-okaze tute trafe, ricevi la etiketon “movada”. Ĉi-lastan mi recenzas ĉi tie. La aliaj du estas recenzitaj sube.

La movadan artikolaron, samkiel la tutan libron, karakterizas grandegaj diferencoj, kaj enhavaj, kaj formaj, kaj kvalitaj. Enestas sciencnivelaĵoj kaj hobiaĵoj, novenhavaj kaj ripetantaj, esperantaj kaj etnolingvaj, brile verkitaj kaj koncepte enigmaj. La libro certe estas interesegega sekco de la Esperanto-movado.

Fasko da kontribuaĵoj iel rilatas al la socia rolo de internacia lingvo. M. H. Saheb-Zamani motivas kial irana islamano subtenas Esperanton. Li revuas aron da lingvoj, interetne uzatajn dum la historio de okcidenta Azio kaj de la mondo, pri kiuj li ekscese piednotas. Saheb-Zamani emfazas la nesufiĉecon de regiona solvo kaj pledas por tutmonda. Ankaŭ Claude Piron havas tutmondan perspek-

tivon. Li montras, ke en interetna lingvo produkte uzebla sistemo de fidindaj, konsekvencaj gramatikaj reguloj efikas “demokrate”, t.e. samŝancige, por la anoj de tre malsamaj gepatraj lingvoj. Werner Bormann iom malpli klare vortumas similan ideon: Esperanto estas des pli enkondukebla, ju pli facila ĝi restas. Laŭ mi li imagas la funkciekanismon de gramatiko en la ĉiutaga lingvouzado iom tro abstrakta kaj konscia, sed certe estas trafa lia pledo, ke oni strebu enkonduki Esperanton ne tuj kiel “duan lingvon por ĉiu”, sed unue tie, kie ĝi estas vere bezonata.

Stefan Maul traktas tian bezonterenon. Li skizas la mondan situacion de informperado, la monopolan pozicion de la grandaj gazetaraj informagentejoj kaj iliaj lingvoj, menciante ankaŭ la tordojn kaj mistradukojn kiuj okazas pro la punta funkcio de la agentejaj lingvoj, ĉefe la angla, la franca ktp. La respondo de Maul estas konata, *Monato*, sed li konscias ke li estas malproksima de la celo, kio ŝuldiĝas nelaste ankaŭ al la maltrograndeco de la Esperanta lingvokomunumo, lia aŭtoraro kaj legantaro. Peter Forster listigas, ne multe analizante, antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto de ekstermovaduloj.

La sufiĉe abstrakte sociteoria kontribuaĵo de Tadeusz Ejsmont pri la idearo ligita al Esperanto ankoraŭ apartenas al la ĵus priparolita grupo, sed jam formas ponton al la

Ĉu Régulo ne superus ĝin?

En la “kultura” parto de la esearo, modelaj laŭ mi estas “La oreloj de Profesoro Juan Régulo Pérez” (L. H. Knoedt)* kaj — miniatura temo tradicia en tia festlibro, dum Knoedt verkis pri miniaturoj — “Liva [maldekstrema? goŝa? ne, temas pri malgranda Kurlanda popolo!] poezio en Esperanto” (P. Ariste).

“Mankas eldonistoj” — jen komuna temo de pluraj aŭtoroj. Plej kortuŝa alineo en la libro listigas 14 neeldonitajn librojn de Karolo Piĉ (dum alia ĉefia aŭtoro en “Taskoj de nia literaturo beletra kaj faka” plej elokventas pri la propraj neaperintaj tradukoj). Plej zorge argumentas tiun mankon Aldo de’ Giorgi: sen instigo de eldonisto, kiel Régulo Pérez subtenis Ragnarsson kontraŭ Kalocsay aŭ helpis la mortantan Emban (legu lian elstaran eseon en *Fonto* 51), poetoj preferas traduki aŭ devas eldoni sin mem. Rezulte: “nur du pintvaloraj poetoj en 12 jaroj”. (Mi ne perfidos kiuj estas tiuj du, same kiel mi ne diros kiel Edwin de Kock sukcesis elekti la 15 plej bonajn E-poetojn sen Kurzens!)

La fatalan influon de tradukpostuloj plej konvinke montras brila pastiĉo de J. Rumler, “Koncepto pri la

diversaj stiloj kaj ĝia apliko al la Esperanta leksiko”, kun sukaj barbarismoj kiel “porekzemple” aŭ “la internacia formo of la termino” — ankaŭ la angla estas bela lingvo, kiel dirus iu mia konato. Temas pri “sinonimoj, kiuj ebligas adekvate esprimi la riĉecon de la pensoj, sentoj kaj rilatoj de la nuna homaro”, kvazaŭ helpus ne subtilaj distingo, sed ĝuste la konfuze similsignifaj vortoj per kiuj oni kutime kaŝas pensmizeron! Liaj glosoj ja neniel precizigas nuancojn de *autem*, *nam*, *ma*, *omno* . . . “La plej bonaj aktoroj en la mondo, por tragedioj, komedioj, historioj, pastoraloj, pastoralaj komedioj, historio-pastoraloj, tragedio-historioj, tragedio-komedio-historio-pastoraloj, por dramoj sendividaj kaj por poemoj senfinaj,” diris Polonio (en *Hamleto*), kaj tian suke sekan esprimmanieron Rumler foje atingas. Ĉu vere ebla celo, fiksi per radikoj la distingojn kiujn faras ĉiuj lingvoj? Aŭ ĉu vere temas nur, plifaciligi al tradukistoj serĉadon de rimoj?

Plej persvade argumentas *por* neologismoj de Diego, ke ilia “arkaisma regusto” efikis en *Kiĥoto*.

Menciindas Rosbach kun traduko el Ovidio pri Ikaro, kompreneble piĉa “Simpozio pri -ata/-ita”, enigma tezo de Ragnarsson “Esperanto kiel antilingvo” (t.e. lingvo de fermita rondo, de socia subgrupo) . . . Krom ili la plej bona eseo pri kultura temo estas nepre tiu de Paul Neergaard pri plantnomoj. Régulo Pérez ja mem skribis (*Fonto* 51) ke la libroj eldonitaj de li “estas kvazaŭ *flugantaj semoj*, kiuj portas mian nomon kiel flokon de l’arto de iliaj aŭtoroj” . . . Lingve plej allogas Probal

*Sur la oreloj (la refaldoj de la kovriloj) de Stafetaj libroj Régulo Pérez modeste, tro modeste, praktikis sian arton. Ankoraŭ mankas lia esearo, kiun li promesis kiel la 13-an eldonaĵon. Tian libron mi sopiris dum jardekoj.

grupo pri **kulturo**. Humphrey Tonkin inspektas Esperanton kiel socian fenomenon, interesigante pri ĝia origino en la etburĝa klera medio de Zamenhof. William Auld ligas la fakton, ke kulturo distingiĝas ĝuste per artefariteco, al la starigo de kulturo, portata de Esperanto, kun tiu eco, kiun Zamenhof nomis “neŭtrale homa”.

Pri **pluplanado** de la planlingvo Esperanto interesiĝas Rüdiger Eichholz, kiu studas la rolon de Esperanto en la komputila traduksistemo DLT kaj la eventualajn efikojn de DLT al la normala Esperanto. En la kazo de lia artikolo aparte forte sentiĝas, ke oni komencis redakti la libron tri-kvar jarojn antaŭ la festo. La evoluo de DLT delonge for-rapidis de la priskribita situacio, sed des pli interese estas nun taksi la tiamajn antaŭdirojn de Eichholz.

En tio, kion skribas Helmar Frank — unu el du artikoloj pri **instruado** — ne tiom sentiĝas la aĝo de la teksto. Estas versio de lia konata prelego pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (kiun Frank nomas “ILO”). Peter Zlatnar tuŝas la saman temon kaj pliriĉigas ĝin per diskonigindaj ideoj pri la pedagogia valoro de la tutmonda orientiĝo perata de Esperanto kiel internacia lingvo.

Du novajn facetojn de la **historio** de la Esperanto-movado alportas du aŭtoroj, kiuj devus pri ĝi enciklopedii. Reinhard Haupenthal per sia aprezinda dokumentista ekzaktemo prezentas la faktojn kaj dokumentojn troveblajn pri iama aktivulo de la germana Esperanto-movado, Albert Schramm (1880-1937). Aperas aro da ĝis nun ne publikigitaj leteroj de Zamenhof al Schramm, ne tre enhavoriĉaj, sed tamen arkivkompletigaj. Ulrich Lins detale prezentas la historion de la Internacio de Proleta Esperantistaro, kiu aktivis en aro da landoj de 1932 ĝis la Dua Mondmilito.



Supre, Juan Régulo Pérez en Varsovio: lia ama eldona laboro inspiris tutan generacion de Esperanto-kulturuloj.

La plej **hobia** el la kontribuaĵoj estas tiu de Hugo Röllinger, riĉe ilustrita versio de lia katalogo de Zamenhof-bustoj, Esperanto-memortabuloj kaj Régulo-Pérez-stratoj, por kiu la redaktoroj grandanime disponigis ne malpli ol 58 paĝojn.

Kiel ofte estas en la kazo de omaĝlibroj, ankaŭ ĉi tiu havas tre vastan kaj malkoheran temaron kaj ne estas verkita por difinita celgrupo. Kelkaj aŭtoroj informas pri novaĵoj (aĵoj novaj en 1984), aliaj klopodas klarigi al la esperantistoj faktojn bone konatajn ekster ilia medio, iuj priskribas por nemovadanoj Esperanton kaj ĝian parolantaron, kaj kelkaj simple sendis plian version de sia kutima artikolo. Eĉ se tia bunteco eble estas allasebla aŭ eĉ tipa por omaĝlibroj, mi kredas, ke zorga redaktado povintus konduki al multe pli bona tuto. Ŝajnas tamen, ke la redakta komitato ĉefe okupiĝis pri kolektado de la artikoloj, dum ĝi plenumintus sian rolon multe pli fake se ĝi konsilus kaj gvidlinius al la aŭtoroj. Tiu kiu rakontas jam vaste konatajn faktojn pri la esperantistoj, skribu etnolingve, por nova publiko. Tiu kiu alportas informojn el movade malbone konata scienco, skribu en Esperanto. Tiu kiu ekspozicias kolekton de materialo motivu ankaŭ la celon kaj utilon de la kolektado. Tiu kiu mencias aŭtorojn, aldonu precizan referencon. Sendube eblas ordigi artikolojn pli inteligente ol laŭ la alfabeto de la aŭtoroj, kaj pli: Se oni ordigus laŭteme, estus bona ideo igi la aŭtorojn diskuti inter si. Ja sufiĉis la tempo por ĉirkaŭ du jarojn post la verkado enmeti postskribaĵojn. Kial ne dissendi similtajn kaj kontraŭdirajn manuskriptojn al diversaj aŭtoroj, instigante ilin reagi unu al la alia en tiuj postskribaĵoj?

Klaus Schubert (Nederlando)

Daŝgupto pri “Adverboj en Esperanto” kaj plej urĝas Nagata Akiko pri lingvikaj vortoj de vidpunkto neeŭropa . . . Sed mi grimpas trans la pikdraton de mia triono. Kiel faris pluraj poetoj: ankaŭ Pilger pri transskriboj el la nederlanda, Vatré pri statistikoj . . . Ĉu lingvistoj saltos en la mian, trovante ke ĉe ili nenio bona estas nova kaj inverse? Nu, feliĉe “la limoj inter la diversaj stiloj ne estas ŝtataj limoj” (Rumler). Ĉiuj certe ĝuos “Esperantajn kabaredojn” (Roger Bernard) kaj Marjorie Boulton pri la karnavala etoso en Barlastono. Sed eble oni eĉ pli ĝuos la *Rikolton*, la promesitan esearon de Régulo Pérez.

Kris Long (Britio)

Scienco renkontas klubojn

La lingvistika parto de la volumo *Esperantismo de Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo* ŝajnas esti plej ampleksa; la artikolaro tre malhomogena. Estas pritraktitaj ĝeneralaj teoriaj problemoj, prezentitaj propraj esplorrezultoj kaj konkludoj por la estonteco. La aŭtoroj foje uzas eksklusive fakan lingvaĵon, foje nur la ĉiutagan propagandan... Jes, *Serta* oni povas proponi al ĉiu, ĉar certe ĉiu trovos multon interesan por si.

Kolekton de teoriaj artikoloj malfermas la analizo de Detlev Blanke pri la diversaj terminoj uzataj por la nocio: lingvo konscie kreita fare de la homo kaj uzata de diverslingvanoj en internaciaj rilatoj. Aleksandr Duli-

ĉenko, analizinte priskribo-principojn aplikitajn en interlingvistiko (historia-lingvistika, struktura-tipologia, registra kaj bibliografia) proponas akcepti la kvinan, nome enciklopedian. Laŭ ĝi la priskribo de planlingvo enhavu ĉiujn indikojn rilatantajn al ĉiu lingvoprojekto. Alian, por la praktiko gravan problemon, nome difini kriteriojn por vortara internacieco ĉe diversaj planlingvoj, prilumas la kontribuo de W. A. Verloren van Themaat.

Metodologiaj kaj terminologiaj problemoj priskribi Esperanton okupas la atenton de Michel Duc Goninaz. Li analizas (citante ekzemplojn de PAG kaj PIV) diversajn embuskojn, en kiujn falis Esperantaj gramatikistoj. Konklude li prezentas siajn proponojn por koherigo de la priskribo de E-aj gramatikaĵoj. Iom ligitaj estas tre profunda kaj detala recenzo pri PAG de Violin Oljanov, kiu kritikas trovitajn nekorektaĵojn kaj erarojn, kaj forta rebato de lia samlandano Ljubomir Miĥajlov.

La historion de la lingvaj instancoj de la E-movado traktas en siaj artikoloj André Albaut kaj Alec Venture. Dum Albaut i.a. pledas por sistemeca priskribo de ili, Venture traktas plej gravajn decidojn, kiuj okupis la atenton de niaj lingvaj instancoj dum multaj jardekoj antaŭ ol ili venis al firmaj decidoj.

Originalaj prilingvaj esploroj okupas rimarkindan parton de la artikolaro. Ni menciuj Probal Daŝgupton, kiu elirinte el eĉ por lingvistikaj laikoj komprenebla konstato, ke “adjektivoj kvalifikas ion substantivan; adverboj, ne,” ekaplikas la pensilojn de la nuntempa lingvistiko kaj venigas la legantojn al plej malfacilaj sektoroj de sintakso. Alia lingvistika kontribuo estas tiu de Geraldo Mattos, kiu prezentas sian ellaboritan sistemon de la Esperanta verbo. Fabrizio Pennacchietti en sia artikolo ekzamenas, kiel en la faldoj de pluraj E-aj radikoj sedimentiĝis elementoj siatempe funkciplenaj kaj aktivaj, kiuj retroiras al la prahindeŭropaj refleksivoj.

La Unua Libro estiĝis esplorobjekto de Itô Kanzi — kiu detektivas pri la misteraj eldonoj de ĝi, studante kaj la enhavajn diferencojn kaj la cenzurajn datojn — kaj Naokazu Kawasaki, kies atenton altiris fremdaj vortoj en la Unua Libro kaj propraj nomoj en la Ekzercoj de la Dua Libro.

Dum Akiko Nagata argumentas kontraŭ la tendenco enkonduki fremdajn fakesprimojn anstataŭ krei ilin el elementoj jam ekzistantaj, Neergaard en sia analizo de E-plantnomoj distingas inter la bezonoj de faka-sciencia lingvo kaj komuna lingvo uzata de nefakuloj. Li opinias, ke la praktiko de etnaj lingvoj tiurilate povas esti certagrade gvida. Fremdlingvaj importaĵoj okupas ankaŭ Wouter F. Pilger kaj Bernard Golden (esperantigo de nederlandaj loknomoj kaj hispanlingvaj vortoj respektive). La aŭtoroj prezentas regularojn, per kies apliko la transskribo povus fariĝi pli kohera.

Ivo Lapenna montras kiel Esperanto pro sia fleksebleco — permesante ne nur esprimi ĉiujn nuancojn de la homa vivo, sed ankaŭ imiti la stilon de la originalo — estas aparte taŭga instrumento de internacia jura komunikado.

Al komparstudoj inter Esperanto kaj etnaj lingvoj estas dediĉitaj du artikoloj. John Wells ekzamenas la fonetikan interferon, kiun alfrontas parolantoj de la hispana kaj angla lingvoj. La aŭtoro Olaf Reiersol kaj Richard E. Wood, dezirante prilumi la relativan facilecon de Esperanto, entreprenis komparanalizon de elektitaj E-aj afiksoj kun la al ili korespondaj anglalingvaj.


La artikolkolekto kaj ties aŭtoroj plene respegulas la esperantologian branĉon de nia movado. Se iu rimarkos, ke en ĝi eble kelkfoje tro facile intermiksiĝas universitat-nivele aŭtentika fakeco kun E-klubega amatoreco, oni perceptu tion kiel ateston pri kiel dum la lastaj jardekoj la fenomeno Esperanto estis envicigata en la sciencan tagordon.

Ryszard Rokicki (Pollando)

JUBILEOJ

Du movadaj centjariĝoj

En 1888 la volapukistoj en Veliko Tarnovo (Bulgario) esperantiĝis. Okaze tiun 100-jaran jubileon estis organizita Semajno de Esperanto-kulturo (13-18 majo): koncerto en la urbo-domo, radio-elsendo, artikolaro en la urba kaj regiona gazetaro, granda ekspozicio el filatelaĵoj, bildkartoj, lernolibroj de Esperanto, Esperanta literaturo. La bulgara televido krome reeĥis la eventon.



La esperantista societo “Lumo” de la urbo eldonis du afiŝojn, kovertajn kaj poŝtkartojn kun emblemoj de la jubileo, kaj funkciis poŝta stampo “Komenco de organizita Esperanto-movado — 5000 V. Tarnovo — Esperanto 1888-1988”.

Olga Cankova (Bulgario)

Ni kore invitas vin, estimataj lingvo-amikoj en FR Germanio kaj ĉie en la mondo, festi kun ni unikan jubileon ĉi-aŭtune. Ni longe hezitis, ĉu ni festu tiun datrevenon en tiu formo, kiun ni nun decidis — publike — aŭ ĉu ni tion faru nur en malgranda rondo. Ni finfine decidis mond-vaste inviti al tiu jubileo, kiu estas nur unufoje festebla. Sed en Nurenbergo (Nürnberg), la dua plej granda urbo de Bavario, ne nur fondiĝis la unua Esperanto-grupo de la mondo: en Nurenbergo ankaŭ aperis la unua Esperanto-gazeto en la jaro 1889. En la jaro 1923 Nurenbergo gastigis la 15-an Universalan Kongreson de Esperanto kun preskaŭ 5000 partoprenantoj.

Ni do invitas vin al la semajnfino de **21-23 oktobro 1988**, por kiu ni jam komencis la preparlaborojn. La programo antaŭvidas interkonan vesperon, urban gvidadon kaj fest-vesperon kun honoraj gastoj kaj festa programo. Muzikos la fervojista arĉorkestro de Nurenbergo kaj kantos la nurenberga fervojista kanthoro. Festprelegos la direktoro de la Germana Esperanto-Instituto, d-ro Werner Bormann.

Informoj kaj aliĝiloj haveblas ĉe: Bayerische Esperanto-Liga e. V., Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg ĝis la **unua de septembro 1988**. Koran bonvenon al Nurenbergo!

Hermann Schmid
Prezidanto, Bavara E-Ligo

Ester Keil
Prezidantino, E-Grupo Nurenbergo

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Alia muziko por “La Espero”?

Mi tre forte samopinias kun tio, kion proponis s-ro Tvarožek en la februara “Reagoj”: ni havigu al nia himno novan, majestan, pacinstigan melodion pere de internacia konkurso.

Carlos A. Santos (Brazilo)

Pri tiu afero mi volas prezenti al vi mian ateston. Mia patrino, 86-jara, komencis lerni Esperanton antaŭ kvin jaroj. Ekde 1983 ŝi partoprenas en ĉiuj brazilaj kongresoj. Dum la kantado de nia himno ŝi ĉiam faras komentarion pri la malĝusteco de la muziko, kaj finas demandante: “Kial ili ne ŝanĝas tian muzikon, kiu ne estas konforma al la teksto? Estas necese fari amomuzikon por tiu poemo, kiu kantas pri paco.”

Ĝuste pro tio mi konsentas kun la propono de s-ro Tvarožek, sed mi aldonas:

a) Eble oni povus aranĝi internacian konkurson kaj el la prezentitaj konkursaĵoj kompetenta komisiono elektus du muzikojn;

b) En la 74-a UK la tuta kongresanaro, post aŭdado de ambaŭ muzikoj, elektus la pli taŭgan.

I. de Miranda e Silva (Brazilo)

Ĉiu speco de muziko havas sian specialan emocian efikon. La efiko de la marŝo estas gajiga, fortiga kaj entuziasmiga. . . .

La eraro estas ĉe la militistoj, kiuj komprenis tiun gajigan entuziasmigan influon de tiu ritmo kaj utiligis ĝin por gajigi la soldatojn, por trompi ilin, por forgesigi al ili ke ili estas senditaj al tre malgaja kaj vere krima misio: mortigi siajn samspeculojn. La marŝoj estas belaj kaj bonaj, sed la militista uzo estas trompa.

Do, ne estu ŝanĝemulo pri nia himno. Se en la tuta mondo la militistoj uzas marŝojn, tio ne faras militistojn el ĉiu kiu ludas aŭ kantas marŝon.

May Bijleveld (Brazilo)

Erari estas home . . .

“En 1988, same kiel en 1906, ne ĉiuj esperantistoj perfekte regas la lingvon. Do en la venonta jarcento, *iu* (nenomita) faru *ion* (nespecifitan) por forigi tiun problemon.”

Tio resumas, per 27 vortoj anstataŭ mil, la artikolon de Bernard Golden (aprilo 1988/p.74). Ĉu vere tia banala konstataĵo meritis tioman spacon en nia revuo? Jes, kompreneble oni daŭre renkontas lingvajn erarojn, en Esperanto same kiel en ĉiu alia lingvo: la homoj ne ĉiam konsultas gramatikon antaŭ ol babili pri la vetero. Jes, kompreneble eĉ Akademianoj foje misuzas vorton: ili ja estas nuraj homoj.

Esperanto cetere frontas problemojn, kiuj ne tuŝas aliajn lingvojn. Por la plejmulto de la esperantistoj, Esperanto estas dua lingvo. Ili ne lernas ĝin ĉe la patrino sino; ili ne uzas ĝin ĉiutage; ili legas kaj skribas ĝin relative malofte, kompare kun sia denaska lingvo; ili aŭskultas kaj parolas ĝin eĉ pli malofte. Apenaŭ surprize do, ke ili ne majstras la lingvon: oni miras nur, ke eraroj ne estas eĉ pli abundaj.

Laŭ Golden, ni faris nenian progreson tiurilate en nia unua jarcento; sed li ne degnas pravi tiun aserton. Miatakse li eraras: ekzemple, la lingvo-uzo en fruaj gazetoj estis nepre pli ĥaosa, ol hodiaŭ.

Golden proponas, ke iu (nenomita) analizu la faktan lingvuzon, kaj surbaze de tiu analizo planadu kaj direktadu la evolu-tendencojn de la lingvo. Sed *kiel?* Ĝuste *kiu* decidu kiajn gramatikajn simpligojn ni alprenu? Kaj kiu trudu tiujn simpligitajn formojn al la tradiciema esperantistaro?

Jes, ni strebadi por plibonigi nian lingvoscion: tio restas same tiel necesa en 1988, kiel en 1906. Sed pli gravas, ke oni *uzu* la lingvon, ol ke oni studu sekajn gramatikojn. Amasa ĉiutaga uzado de Esperanto pli signife kontribuos al la demokratia evoluo de la lingvo, ol akademiaj studaĵoj.

Dermod Quirke (Britio)

. . . kaj ankaŭ gramatike

Parolante pri transitiveco de verboj kolego Golden citis du erarojn, aperintajn en *Heroldo*, kaj bonkore kaj amike evitis indiki la kulpulon, kiu estas . . . mi. Nu, ĉikaze Golden (eble) pravus, kaj mi ne emas diskuti, tamen mi deziras aldoni ke, en pluraj aliaj kazoj, mi intence uzas verbojn malpive (t.e. ne laŭ la indikoj de PIV, kiu, miaopinie, ne estas evangelio). Por citi nur du ekzemplojn, mi ne akceptas la transitivecon de verboj, kiel *dolori* kaj *urĝi*. Mi ne diras “doloras min la kapo” sed “doloras al mi la kapo”.

En la sama numero ankaŭ estas interesa la respondo de prof. Blanke pri la Akademio. Persone mi pensas, ke multaj el la dubaj, eĉ kritikaj opinioj pri nia Akademio dependas *ankaŭ* de la fakto, ke ĝi tro malmulte, preskaŭ neniel, diskonigas sian agadon, siajn laboron kaj diskutojn. Ekzemple: en nur unu revuo (*Budapeŝta Informilo*) mi legis pri la lastjaraj novaj elektoj.

Aldo de' Giorgi (Italio)

“Urĝe bezonata estas didaktike uzebla gramatiko de la lingvo, kiu malkomplikos la enhavon de [PAG].” Tiun bezonon mi konstatis, kiel sendube miloj da aliaj, je ekstudo de PAG, kaj en IEI ni jam diskutis la apartan bezonon de tia gramatiko por niaj Cseh-metodaj kursgvidantoj. Produkti ĝin urĝas, sed kiu ĝin verku? Miaopinie devus entrepreni la taskon grupo da kompetentuloj el la diversaj lingvogrupoj; inter ili estu pedagogoj spertaj je ĉiu nivelo de lingvoinstruado. Planon por laboro de tia grupo, en la kadro de mia propra instru-agado, mi jam skizis, kaj intertempe uzas kaj rekomendas: *La tuta Esperanto* de Henrik Seppik, kaj *Gramatika ekzercaro* de J. P. Bieliński.

Ambaŭ tre utilas al kursgvidantoj.

Audrey Childs-Mee

Postbus 25041

3001 HA Rotterdam, Nederlando

Amo, amor, adoro. Mira Andrusiewicz. Jelenia Góra: Soci-kultura Societo kaj Pola Esperanto-Asocio, 1987. 67p. 20cm. Ilus. Poemoj verkitaj originale en Esperanto. Prezo: 15,00 gld.

Anne Frank ne estas de hieraŭ. Mies Bouhuys. El la nederlanda trad. Nora Bartels. Apeldoorn: FELUA, 1988. 194p. 21cm. Grandlitera. Mapo. Rakonto pri la juda knabino en Amsterdamo, kies taglibro fariĝis fama atestaĵo pri la kontraŭhomeco de la naziismo. Prezo: 15,00 gld.

Bahaa religio, La. Ĝiaj ĉefaj instruoj kaj rilatoj al Esperanto. Heinz Dieter Maas. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 31p. 21cm. Prezo: 7,50 gld.

Brilas saĝo. Ŭang Zikun k.a. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 206p. 18cm. Ilus. 66 eseetoj pri bazaj sciencoj kaj modernaj teknikoj. Prezo: 5,70 gld.

En fremda urbo. Arvo Valton. El la estona trad. Antonina Apollo. Tallinn: Eesti Raamat, 1987. 263p. 16cm. Noveloj kaj miniaturoj de la "estona Ĉeĥov" kun "multege da Gogol kaj sufiĉa dozo de Kafka". Prezo: 13,50 gld.

Esperanta bildvortaro. Kompilis Rüdiger Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1988. 880p. 19cm. Ilus. Kun terminoj por 25 000 objektoj difinitaj per bildoj. Prezo: 90,00 gld.

Esperanta medicina literaturo. Titolaro de medicinaj artikoloj en *Medicina revuo* kaj *Medicina internacia revuo* (1951-1986). Komp. Saburó Yamazoe. Maebasi: la aŭtoro, 1987. 28p. 21cm. Prezo: 5,70 gld.

Esperanta rimvortaro. Jonathan Cooley. Egham: la aŭtoro, 1987. 79p. 21cm. Enhavas preskaŭ 20 mil vortojn. Prezo: 14,10 gld.

Esperanto (1937), L. L. Zamenhof, en la portugalan trad. Ismael Gomes Braga. Rio/Brasília: Federacao Espírita Brasileira, 1987 (3a eld.). 112p. 18cm. Dulingva eldono de "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia". Prezo: 6,00 gld.

Esperanto-modelo (1938). L. L. Zamenhof k.a., red. Ismael Gomes Braga, antaŭparolo de A. Caetano Coutinho. Rio/Brasília: Federacao Espírita Brasileira, 1987 (2a eld.). 224p. 18cm. La zamenhofaj Ekzercaro, Lingvaj Respondoj, kongresaj paroladoj kaj "Esenco kaj estonteco", plus kelkaj fruaj tradukoj fare de aliaj el la brazila literaturo. Prezo: 6,00 gld.

Esperanto-Türkçe Sözlük. Esperanto-turka vortaro. Bekir Karayel. Ankara: la aŭtoro, 1987 (ne indikita). 222p. 16cm. Unu-direkta. Prezo: 9,90 gld.

Formoj de vizaĝo. Tadeusz Różewicz (1921-). El la pola trad. Tyburcjusz Tyblewski. Jelenia Góra: Soci-Kultura Societo kaj Pola Esperanto-Asocio, 1987. 83p. 20cm. Novelo kaj poemoj de la tria plej tradukata pola verkisto. Prezo: 16,50 gld.

Laŭtema vortaro Esperanto-angla-ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 211p. 19cm. Bind. Pli ol sep mil Esperantaj kapvortoj kun ekvivalentoj en la angla kaj ĉina. Prezo: 18,00 gld.

Litovio hodiaŭ. Div. aŭtoroj, el la litova trad. K. Puodenas. Vilnius: Mintis, 1987. 96p. 20cm. ISSN 0235-0769. La unua Esperanta numero de revuo eldonata ankaŭ en la rusa, angla, germana kaj franca lingvoj. Prezo: 4,50 gld.

Meditadoj kaj pensoj (Dialektiko de Bona Volo). Paiva Netto. Trad. el la portugala Walter Francini. São Paulo: Legio de Bona Volo, 1988 (ne indikita). 254p. 13cm. Ilus. Dirajoj de la gvidanto de brazila ekumenisma organizaĵo. Prezo: 20,40 gld.

Poezia arto, La. Baldur Ragnarsson. Kvin prelegoj faritaj en la kadro de la 26-a Kultura Semajnfino de SEL. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1988. 55p. 20cm. Profunda pritrakto de kelkaj esencaj ecoj de la Esperanta poezio, ekzemple la "pasiva-romantika" kaj "aktiva-intelektika" sintenoj. Prezo: 18,90 gld.

Scenaro de la Tria Mondmilito. Laŭ la profetaĵoj de Wladyslaw Biernacki. Trad. el la angla kaj nederlanda versioj Manuel Halvelik. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 68p. 20cm. Mapoj. Vizio pri estonta milito, bazita sur la Apokalipso de la apostolo Johano. Prezo: 16,50 gld.

Sukero, nutrado, kario. Renate kaj Walter Klag. Vieno: la aŭtoroj, 1988. 16p. 21cm. Mimeo. Faktoj pri sukero kaj la homa sano. Prezo: 1,80 gld.

Tibeto sur la monda tegmento. Komp. la Redakcio de EPĈ. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 132p. 27cm. Kolorilus. Pri historio, geografio, kulturo ktp. Prezo: 35,70 gld.

Two Aspirations of Humanity, The. One Universal Scientific Religion and One International Common Language. Dr. Nassif Isaac. London: Regency Press, 1987 (ne indikita). "Du aspiroj de la homaro: universala scienca religio kaj internacia komuna lingvo." Prezo: 24,00 gld.

Volapükabled, n-ro 4. Red. Reinhard Haupenthal. Scheidt: Artur E. Iltis, 1988. 88p. 21cm. ISSN 0179-1931. Prezo: 12,60 gld.

DIVERSAĴOJ

Instrukompleto: Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (Bichinhos, bichões e bicharocos). Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, s.d. Esperanta kaj portugala libretoj, dulingva kasedo, 65 koloraj diapozitivoj. Versaĵoj, muzike akompanataj, por uzo kun ilustraj lumbildoj. Prezo: 55,80 gld. Kasedo sola: 12,00 gld.

Kasedo: En fora lando... Kantas Ramona van Dalsem. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. Dek kvar originalaj kantoj, kun akompano de la grupo Sento Oriental'. Prezo: 27,00 gld.

Videokasedo: La graveco de la fideleco. Oscar Wilde. El la angla trad. William Auld. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1987. VHS-videokasedo de jubilea prezento en la teatrejo Bloomsbury, Londono, en julio de 1987. Prezo: 132,60 gld.

Kasedo: Imagu! John Douglas. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1987. 12 modernaj kaj tradiciaj kantoj, tradukitaj el la angla de W. Auld, H. W. Holmes kaj R. Rossetti. Prezo: 25,80 gld.

Instrukompleto: Kantu kaj lernu. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1983. Portugallingva kurso kun 4 diskoj, murafiŝo, gvidlibro kaj 600-vortelementa legolibro. Prezo: 27,90 gld.

Kasedo: Konkoj (Muscheln/Muszele). Jan Stanislaw Skorupski. Berlin: Bardo, 1988. Trilingva kasedo kun 10 mar-etosaj kantoj. Prezo: 17,10 gld.

Instrukompleto: Lernu kantante. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1985. Progresiga perkanta kurso, kun 8 diskoj, 3 kantlibretoj kaj 1500-vortelementa legolibro kun laŭpaĝa vortareto. Prezo: 33,90 gld.

Poŝtkartokompleto: Luktarto de Ŝaŭlin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. Dek unu koloraj poŝtkartoj de saltantaj luktistoj. Prezo: 2,70 gld.

Kasedo: 62 minutoj. Stokholmo: Persone, 1987. 12 originalaj kantoj de la sveda rokgrupo, inkluzive de "Ĉu vi pentas?" Aparta vortlibreto. Prezo: 27,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Mil paĝoj:** El la organo de Jokohama Esperanto-Rondo, *La tamtamo*, ni eksciis pri leg-instiga kampanjo de ties libroservo. En 1987 partoprenis 25 klubanoj, farante deklaron pri la nombro de paĝoj en Esperanto, kiun ili celos legi dum la jaro. 8 atingis sian celon kaj ricevis atestilon kaj libro-premion.

La tamtamo estas cetere iom unika revuo pro sia novaĵsekcio en Esperanto, *Novaĵoj tamtamas*. Temas ne nur pri aktualaj el la japana movado, sed ankaŭ pri okazaĵoj en kaj ĉirkaŭ la urbo, kiuj povus interesi alilandan leganton. Abonu kontraŭ 11 irk ĉe Jokohama Esperanto-Rondo, 18-14-Saido 1—Ĉoome, Koonan-ku, Jokohamo, 233 Japanio.

● **Scienca mondo:** Malfrue sed fine venis n-ro 4, 1987, de ĉi tiu Bulgario produktata "oficiala organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj" — kiu aperas krome en la angla, franca, germana kaj rusa. Malgraŭ prezento tute senfantazia kaj certa emo ripetadi sloganajn esprimojn, la revuo pritraktas gravajn temojn: i.a. la kontrolo de nukleaj bomboprovoj (kunartikolo de usonaj kaj sovetiaj sciencistoj), komputiloj kaj la Tria Mondo kaj la ebleco harmoniigi scienc-teknikan progreson kun ekologiaj postuloj. Abonu pere de UEA (10,50 gld.).



● **Kongresaj libroj:** La Universala Kongreso en Roterdamo stimulis la eldonon en Esperanto de du famaj verkoj. UEA mem aranĝis la tradukon el la latina (fare de Gerrit Berveling) de *Laŭdo de l' stulteco*, kiun skribis la plej fama roterdmano, Erasmo, en 1511. Alia profunde humanisma verko estas *Anne Frank ne estas de hieraŭ* de Mies Bouhuys, kies pasia pledo kontraŭ la faŝismo (en traduko de Nora Bartels) kortuŝos kaj inspiras geknabojn kaj plenkreskulojn.

● **Slovaka literaturo:** Kiam alvenis antaŭnelonge la anglalingva *Meridians* 12-23, "Bulteno de Slovaka literaturo", oni preskaŭ forĵetis ĝin sen rimarki ĝian modestan ĉapitron Esperantan. Tie tamen troviĝas la klarigo, ke "ni komencas eldonadi *Meridianoj* ankaŭ en Esperanto... [por] alproksimigi niajn naciajn literaturajn valorojn al la mondo pere de internacia lingvo". Verkistaj biografioj kaj fragmentoj el iliaj verkoj formas promesplenan komencon. Por senpaga abono skribu al Zväz Slovenských Spisovatel'ov (zahraničné oddelenie), Obrancov mieru 14, CS-81508 Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

● **Moderna arto:** Nekutiman okazon por esperantistoj donas katalogo de Slovena pentristo nun loĝanta en Aŭstrio, Valentin Oman. *Oman: Pariza rekviemo* (Mohorjeva/Hermagoras, 1988) entenas 13 grandformatajn kaj lukse presitajn bildojn, kune kun detala enkonduka eseo en la germana, la slovena kaj Esperanto. Pentrart-ŝatantoj, kiuj havas seriozan intereson pri la temo, skribu al la artisto mem por peti ekzempleron: Künstlerhaus, Goethepark 1, A-9020 Klagenfurt/Celovec, Aŭstrio.



● **Progreso:** La ĉi-noma fremdlingva eldonejo de Sovetunio, kiu specialistas pri soci-politikaj kaj sciencaj libroj, ekde 1989 aperigos verkojn ankaŭ en Esperanto. La unuaj tri estas jam anoncitaj: Temas pri *Trarompo*, kolektiva usona-sovetia studaro pri la sekvoj de nuklea milito, kaj du historiaj bildlibroj, *1905: Prologo* kaj *1825: Komploto*. Ĉe *Trarompo* kunlaboras ankaŭ la Kuba eldonejo José Martí.

● **Etnismo:** Armenoj demonstracias en Montar-Karabaĥo, Miskitoj malfidas la Nikaragvajn sandinistojn, Mangosutu Butelezi "gajas" en Sudafriko... jam ĉe la kovrilo de tiu ĉi "informilo pri etnaj problemoj", aprilo 1988, frapas politika aktualeco. Se tio interesas vin, abonon kaj membriĝon en la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (22 germanaj markoj) peras UEA (indiku la kodon ikel-y kaj la jaron de la kotizo).

● **Furorlisto:** En la novaĵletero de la nederlandlingva E-junularo (*JEN*) ni trovis la jenan informon, tonditan el granda nederlanda ĵurnalo:

"La kvinan lokon [sur la listo de la plej furoraj ne-fikciaj libroj en Hungario] okupas la fotolibro *Plezuroj*, kiu same kiel numero naŭ temas pri sekso (tiu lasta evidente havas eksterlandajn ambiciojn: ĝi estas dulingva, en la hungara kaj Esperanto)."

La menciita numero naŭ estas evidente *Kulturo de la amo*, kiu debutis en la juna "Lasta aperis". Ĉu eble ĝi atingos eĉ pli altan rangon sur la sekva furorlisto de UEA?

● **La mano:** Premion meritas la unua numero de tiu ĉi "kultura revuo de HEJS" (la hispana junulara movado) — almenaŭ kiel la plej *nelegebla* eldonaĵo de la jaro. (Tiun komenton elvokis precipe la mispreso de letero, kiun sendis la verkanto de tiu ĉi rubriko!). Tamen, se oni havas sufiĉan paciencon por deĉifri duon-forestajn literojn, oni trovas varion kaj intereson — i.a. la unuan parton de la Prologo al *Mastro de l' ringoj* (J.R.R. Tolkien), kiun nun tradukas William Auld. Por abono turnu vin al HEJS, Sol 75, E-41003 Sevilla.

JARLIBRO 1988

Ni bedaŭras, ke la paĝoj pri Francio ne estis ĝisdatigitaj laŭ la korektoj ĝustatempe senditaj de la ĉefdelegito. Ni pardonpetas pro eventualaj ĝenoj al uzantoj.

Sciigo de la financa fako:

Kiam vi faras pagon al UEA, aŭ al ies konto ĉe UEA, per **internacia poŝtmandato**, metu nian nomon kaj adreson (kaj eventualan mesaĝon) sur la mandaton. Tiel la mandato mem venas ĉi tien kaj ni povas tuj vidi, kiu sendis la pagon kaj por kio ĝi estas sendita. Nepre NE sendu poŝtmandaton rekte al banko aŭ poŝtbanko.

Oni ja povas fari pagon rekte en bankan aŭ poŝtbankan konton, kompreneble, sed ne per poŝtmandato.

Donacoj nekutimaj:

De tempo al tempo UEA ricevas donacojn, kiuj ne klaseblas laŭ la diversaj fondaĵoj k.s. listigitaj sube. Pro tio ni foje forgesas danki la donacintojn en konvena maniero. Ne hezitu memorigi nin, se via malavaro ne ricevis taŭgan kvitancon en la paĝoj de la revuo!

En la lastaj monatoj venis almenaŭ tri valoraj kontribuoj de tiu speco. P. Cugny (Francio) donacis grandan kolekton de poŝtmarkoj, inkluzive de multaj el la jaroj 1910-1920. H. Thien (Nederlando) konfidis al UEA sian unikan fotoarkivon pri la aŭtoro de Esperanto, kiu servis kiel bazo por lia libro *La vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj*. Revudonaco de A. Withoos (Nederlando) ebligis gravan kompletigon de historie gravaj jarkolektoj en la Biblioteko Hodler kaj krome provizis valorajn aŭkciaĵojn. Koran dankon al ili!

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

FR Germanio: S-ino Irene Donat.
Francio: Thierry Lambert.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Usono: Sidney V. Steinberg. **SUBTENANTOJ** (minimumo \$25): Finnlando: Tapio Sormunen. Usono: Joan Gildemeister, David Wolff. **AMIKOJ** (minimumo \$10): Belgio: L. Dreze. Britio: E. Semaska. Finnlando: Lauri Mustonen. FR Germanio: Esperanto-Grupo Nürnberg, Richard Wluka. Nederlando: Robert Moerbeek. Norvegio: Elna Matland, Sigmund Kveim. Usono: Les Amer, Rudolf C. Couppez, Vivi Couppez, Annette Greenland, Frederik J. Belinfante, Dale Alan Diefenbach, Donna R. Stitz, Eleanor B. Stein, John A. Cole, James F. Cool, Kathleen C. Wood, Lois G. Roberts,

Naomi Escalante, Pearl Wegher, Sung Ho Cho, Victor Munson, Adele Wesson, William A. Shanks.

PATRONOJ DE TEJO 1988

Belgio: Elvire De Coene. Britio: Charles Alan Shrivess. Japanio: Ikuko Yazima-Kitagawa. Kanarioj: Aurelio Solis y Pi. Norvegio: Margrete Landmark.

SOCIETO ZAMENHOF 1988

FR Germanio: Roland Schöllkopf. Francio: André Gilles, Thierry Lambert. Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Islando: Hallgrímur Saemundsson. Italio: Medardo Biagi. Japanio: Wilhelm Schmid, Yosimi Umeda. Korea Resp.: S-ro Han Moo-hyup, Yung-myung Kim, D-ro Chang Choong-sik. Nederlando: A. M. E. van Walsem-Schutte, W. C. Keizer, Willy Keizer-Rosenkrantz. Norvegio: Margrete Landmark, Olav Reiersol. Svedio: Hildur Södergren, Nils Olsson, Olle Olsson. Usono: Arnold Victor, Moshe Lewin.

DONACOJ 1988 (gld.) ĝis la 30-a de aprilo

FONDAĴO AFRIKO: Belgio: L. Dreze 100,00. Finnlando: H. Tietto 69,45. FR Germanio: W. Heinrich 560,75. Italio: V. Spina 40,00. Kanado: D. M. Hawley 58,00. Nederlando: H. Bakker 2500,00. Svedio: J. Hammarberg 20,00. Sumo ĉi-jara 6 416,63.

FONDAĴO AZIO: Donaco japana grupo: 702,24. Usono: Won Gill Kim 74,14. Sumo ĉi-jara 776,38.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S. De Weerd 76,82. Finnlando: T. Grundström 15,76. Nederlando: F. Zeiler 70,00. Sumo ĉi-jara 943,33.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Hispanio: María Pi Maynar 200,00. Italio: D. Masterman 43,02. Sumo ĉi-jara 337,50.

ĜENERALA KASO: Francio: C. Tholet 16,30. Jugoslavio: J. Židanik 59,00. Svedio: Maja Ahlström 25,49; E. Rytenberg 100,00. Svislando: H. Schmutz 117,40. Diversaj malgrandaj 6,71. Sumo ĉi-jara 606,74.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo S. Colum Gilfillan 185,34.

JUBILEA JARO: Nederlando: J. W. Dijkstra 50,00.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Belgio: G. Pirlot 53,44. Sumo ĉi-jara 86,49.

FONDAĴO WÜSTER: Anonima donaco 185,01. Sumo ĉi-jara 195,01.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Belgio: L. Dreze 50,00. Sumo ĉi-jara 112,50.

ESPERANTO-CENTRO BIALYSTOK: Italio: Dall'Pozo kaj Conti 41,37. Nederlando: F. Zeiler 70,00. Svedio: E. Rytenberg 256,01. Anonima donaco: 100,00. Sumo ĉi-jara 702,38.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Ĝustigo pri la kataluna junularo

En la junulara rubriko de la aprila numero, ni raportis pri la refondiĝo de Kataluna Esperanto-Junularo — nur parte ĝuste, kiel klarigas la jena letero de KEJ-prezidanto Gemma Armadans:

“Efektive KEJ malfondis sin en novembro 1987 por tuj refondiĝi kiel memstara Asocio (kaj ne plu kiel sekcio de Kataluna Esperanto-Asocio). Tion oni faris, kompreneble, por povi iĝi Landa Sekcio de TEJO. Sed KEJ ne refondiĝis kun la nomo ‘JEKA’, sed konservis sian nomon kaj strukturon... Paralele al tiuj KEJ-demarŝoj, ie aperis la ideo krei grupon, kiu rilatus kun HEJS (la hispana junularo) kaj organizus ties ‘Tendaron’ en Monistrol (Katalunio)... Tiu grupo, tiam kun ok membroj, [rifuzis kontrakton kiu farus ĝin la HEJS-sekcio de KEJ] kaj registriĝis kiel JEKA... [Intertempe] HEJS assembleis en Monistrol kaj voĉdonis favore al aparta HEJS-sekcio ene de KEJ... kiel rimedo por efektiviĝi senkonfliktan kunlaboron inter ambaŭ organizaĵoj. Evidente ĉiaj aliaj organizaĵoj estas bonvenaj, sed ili bonvolu ne krei konfuzon kaj miskomprenon.”

ESPERANTO '88 • 27 nov.-4 dec. 1988 • Havano, Kubo

Internacia konferenco por la evoluo de Esperanto en Iberameriko

PROGRAMO:

- prelegoj kaj diskutoj kun elstaraj figuroj de la Movado
- interŝanĝo de spertoj kaj ideoj por movada kunlaboro
- artaj kaj distraj aranĝoj en amikeca, internacia etoso
- vizitoj al historiaj kaj aliaj turismaj lokoj en Kubo

VOJAĜOJ EL EŬROPO:

Flugu de via plej proksima internacia flughaveno tra Madrido.

Amsterdamo 1827 gld.

Frankfurto 2362 gld.

Kopenhago 2169 gld. (+ imposto)

Londono (Heathrow) 2036 gld.

Parizo (Orly) 2104 gld.

Foriro posttagmeze 26 novembro, reveno tagmeze 5 decembro. La flugo rekte el **Madrid** kostas nur 1 668 gld.

LOĜADO EN HAVANO:

1-a kategorio 866 gld., 2-a kategorio 726 gld. (por kunulo: 1-a kategorio 766 gld., 2-a kategorio 626 gld.)

La prezoj inkluzivas por ĉiu persono 8 tagojn kaj 7 noktojn kun loko en 2-lita ĉambro, matenmanĝo kaj alia manĝo ("duonpensiono"), kaj transporto al ĉiu aranĝo.

Certigu vian partoprenon en ĉi tiu unika aranĝo. Mendu ĉe UEA, Roterdamo.

ĜENERALA, ORGANIKA, KAJ BIOLOGIA KEMIO

Ĉi tiu 574-paĝa kemia lernolibro nun pretas por eldonado. Nia 9-landa teamo de kemiistoj tradukis ĝin laŭ la peto de Triamondanoj por scienca materialo. Tial ni senkoste donos al ili la rajton presi kaj vendi ĝin laŭvole. Eblas ke ĝi eldoniĝos en Ĉinio kaj/aŭ Irano post kelkaj monatoj.

Verŝajne iuj personoj deziros ekposedi ĝin tuj. Tial, ni fotokopios ĝin sur altkvalita papero kaj lukse bindos ĝin. La prezo, liverita surfacoŝte, estos \$120. Tia eldono okazos nur post la ricevo de 30 antaŭpagitaj mendoj.

Se vi ne volas atendi la eldonadon en la Tria Mondo, sendu vian pagilon al: Esperanto-Societo de Ĉikago, Kasisto Bern Wheel, 834 Wenonah, Oak Park, IL 60304, Usono.

Fokuso

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

Inter pli ol 2 700 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara

fama romano de famaj aŭtoro kaj tradukinto

"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo..." (Régulo Pérez)

"La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La faraono'." (Vatré)

Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. P. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.



COVALEX S.A.

Chemin des Voirambeys
Chalet "Les Cascades"
CH-3974 MOLLENS
Svislando

Serĉas importi rekte el fabrikanta lando:

malmultekostajn ● 3 ½" kaj 5 ¼" DS/DD disketojn "IBM-kongruajn"

- "IBM-kongruajn" komputorojn, porteblajn, kun likva-kristala ekrano, 1 aŭ 2 disketlegiloj, ĉiuj naciaj klavaroj, por lernejoj.

Serĉas eksporti kaj traduki en ĉiuj landoj kaj lingvoj:

la propran komputorprogramon pri tajplernado serioze faritan de gefakuloj.

Por ĝia agado "mara agentejo":

serĉas ĉiam, tutmonde kaj ĉiutage ŝip(et/eg)ojn por aĉeti/vendi, lui/luigi okaze de libertempo, laboro ktp... eble ni jam konas la aĉetiston aŭ la vendiston de la ŝipo kiun vi posedas aŭ pri kiu vi revas... kaj plue ni organizas, en Sud-Francio aŭ en la princejo Monako, ĉion pri maraj aferoj: surŝipajn kunvenojn, luigadojn/luadojn surmare aŭ enhavene, subakvigadon, doganajn kaj flagajn formalajojn.

NI KLOPODAS KOMERCI ESPERANTE, NE HEZITU KONTAKTI NIN SKRIBE EN SVISLANDO.

Ni volegas energie labori internacie kaj pro tio, ni havas bankkontojn en Benelukso, Monako, Svislando kaj plue unu komercan kompanion "Jersey (C.I.) Limited Liability Cy (1861-1968)" por solvi la transitajn aferojn.

Bleicher-Eldonejo prezentas:

LA Ulrich Lins DANGERA LINGVO


**meĵloŝtona verko pri
la historio de Esperanto.**

Legiĝas kiel streĉa romano, tiu ĉi pli ol 500-paĝa "studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto". La plej fruajn kontraŭjuĝojn, la nazian subpremon, la ekstermon en Stalina Sovetunio kaj aliajn politikajn atakojn en Okcidento kaj Oriento amplekse analizas kaj piednotas la konata germana esperantologo.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto: 66,00 gld. plus sendokostoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

La perlo de la finna literaturo

KALEVALA



Per la majstra traduko de J.E. Leppäkoski kun postparolo de Vilho Setälä kaj la originalaj bildoj de Akseli Gallen-Kallela en nova kaj luksa grafika aranĝo.

Serio Oriento-Okcidento n-ro 4

"Tia libro valorigas lerni la internacian lingvon kaj ĝi nepre ne manku en la biblioteko de iu ajn Esperanto-klubo. Individuoj prefere rezignu pri pluraj aliaj libroj" (MONATO 3/86).

Eldonis: Esperanto-Asocio de Finnlando/ Helsinki 1985, 392 p., ilus., bindita, ISBN 951-9005-51 X.

Prezo: 45,00 gld. aŭ 95 FIM + sendokostoj. Mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la eldoninto.

"Stafeto"-serio prezentas:

Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas

Manjo Austin

Kiam denove edziniĝas ŝia patrino kaj ili translokiĝas al nova hejmo, malfermiĝas por Maureen nekonata mondo plene de novaj samfamilianoj. Ekiro en la profesian vivon eĉ pli malfaciligas la ŝanĝon. En rakonto, kiu sursceniĝas en irlanda ĉirkaŭaĵo, ni sekvas ŝian kreskon al adolteco.

Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas. 128 p., 330 bfr./18,00 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

La informa revolucio atingas Esperantujojn!



**nova vorto —
nova futuro**

Per la plej modernaj teknikoj — grup-tradukado, komputila kompostado kun lasera presado kaj divido de la eldonlaboro — UEA kaj BSO riĉigas la Esperantan mondon per verko de Luc De Brabandere, "aktoro kaj kunrolanto en la spektaklo de la informadiko". Ĉu eblas akordigi la altan teknologion kun la "verda" alternativo? Jen abundaj ideoj kaj informoj pri eblaj evoluvojoj de la homa socio.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA: **Infoduktoj.** 142p. 21cm. Tabeloj ks. ISBN 92 9017 038 7. **Prezo:** 30,00 gld. plus sendokostoj; triona rabato ekde tri ekzempleroj.

"Stafeto"-serio prezentas:

murdo en esperantujo

Daniel Moirand

Kviete fluetas la kluba vespero, kiam subite malfermiĝas la pordo kaj envenas nekonata viro. Kiam li atingas la tablon, li teren kolapsas. Morta!... Pro tiu okazaĵo leŭtenanto William Hammerkopf eniras la Esperanto-mondon. Ĉu li trovos tie nur morton kaj pereon?

Murdo en Esperantujo. 156 paĝoj, 390 bfr./21,00 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.